

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo

№ 6 (91) decembro 2015



en la numero

40-jariĝo de la Krasnojarska E-klubo

Tanejev kaj Esperanto

10-jariĝo de E@I

45-a IIK invitas

versaĵoj de Klara Ilutoviĉ

Moskvo, 2015

enhavo

- 01 40-jariĝo de la Krasnojarska E-klubo
- 05 Esperanto: Tanejev kaj liaj ĉirkaŭantoj (A.Seliŝĉev)
- 14 TILE-9
- 15 45-a IIK invitas
- 16 10-jariĝo de E@I
- 23 Zamnehof omaĝota de Unesko
- 24 Esperantistoj en Roskilde-Festivalo (J.Penjkova)
- 25 Elektaj en UEA komenciĝas
- 26 Serĉata: nova redaktoro de "Esperanto"
- 27 Malferma tago de adiaŭoj kaj jubileoj
- 28 UEA ĉe UN
- 29 UEA invitas prelegi en la IKU-sesio en Nitro
- 30 S.Jesenin en tradukoj de L.Novikova
- 38 "Mi stelojn jungis al revado..." (fragmento el nova romano de M.Bronŝtejn)
- 47 Anonco de Anatolo Gonĉarov
- 48 Omaĝe al la naskiĝtago de la Majstro (K.Ilutoviĉ)
- k3 Fotoj de la Moskva LF kaj Krasnojarska festeno
- k4 Amuzaj misskriboj kaj eraroj
- k4 Novjara gratulversao
- k4 FELIĈAN NOVAN JARON AL ĈIUJ!



**Ne forgesu (re)aboni
REGon por 2016!**

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

Nº 6 (91) decembro 2015

aperadas ekde 2000

redaktas Georgij Kokolija

kunredaktas Viktor Aroloviĉ

kunlaboras Maksim Griŝin

poŝta adreso: Pjatinickoje ŝosse 45 – 105

125310 Moskvo, Rusio

retadreso: gazeto@mail.ru

abontarifoj por 2016:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj

de KŜŜ – 700 rubloj, sendendaj al:

Кокolia Георгий Владимирович

Пятницкое шоссе 45 – 105

125310 Москва

aŭ pagendaj al: 410011382499386

en la pagsistemo "Яндекс.Деньги"

por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj

*pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*

elektronika abono – 350 rub. (10 eŭr.)

La 22-an de novembro Krasnojarska Esperanto-klubo solene festis sian 40-jariĝon. Venis ĉirkaŭ 25 personoj, inter kiuj estis kaj pioniroj kaj komencantoj de Esperantomovado en nia urbo. Kelkaj renkontis unu la alian post dekoj da jaroj. Komence, Vladimir Sapojnikov – la fondinto de nia klubo – kurte rakontis pri ties historio. Poste elpaŝis ankoraŭ du eksprezidantoj – Sergej Sosikin kaj Aleksej Ĵuravljov. Starante, ni rememoris forpasintajn esperantistojn. Mi voĉlegis gratulojn de diversaj esperantistoj kaj kluboj kaj rakontis pri la nuntempa vivo kaj planoj. Sekvis ĉion abunda “sveda tablo”, kantoj kaj ludoj. Jen estas fotoalbumo <http://vk.com/album-106527521_224495011>. (Evelina Sokolova)



NUR KVARDEK JAROJ!

“... Jam kvardek jaroj pasis post la fondo de Krasnojarska esperantista klubo!..”, – sopirante rememoras preskaŭ ĉiuj, ankaŭ la gekrasnojarskanoj. Verŝajne, en la urbo restis mi sola, kiu scias, ke ni festas la 24-an de novembro ne aperon, sed agnoskon de la klubo en oficialaj instancoj: tiutage, en 1975, la urba komitato de VLKSM decidis “1.Organizi urban klubon de esperantistoj.” ... Kaj tiel plu (rigardu oni la plenan tekston de la decido). Sed similaj decidoj, tiutempe, ne povis aperi senbaze! Kio sekvas el tio ĉi? Konkludo estas rekta: la klubo jam ekzistis!

Ne ĉiuj scias prologon de la historio. Kaj pro tio, de tempo al tempo, venas en scivolemajn kapojn la memkomprenebla demando: de kie aperis esperantistaro, kiu konstruis la legendan klubon? Pro tiu ĉi kaŭzo mi ne volas raporti al vi pri plena historio de la klubo kaj ricevi ovaciojn: unue, niaj rememoroj pezas jam ne solan dikan volumon... Due, estas pli interese ekscii pri la unuaj paŝoj de la klubo kaj ekaŭdi pri forgesitaj kaj neforgeseblaj nomoj kaj personoj... Mi rakontos al vi pri periodo de aŭtuno 1974 ĝis fino de 1975: kiel ĉio komenĉis?..

La 27-an de novembro 1974 en Krasnojarska unuversitato okazis prelego “Kio estas Esperanto?”,





kiun organizis studento de biologi-kemia fakultato Vladimir Sapoĵnikov. Pli ol dudek gestudentoj de kvar fakultatoj partoprenis la aranĝon, kaj ĉiuj senescepte ekdeziris studi Esperanton. Tiel subite, sed ne hazarde, en Krasnojarsk aperis la unua grupo de Esperanto-kursoj post longaj jardekoj de la vakuo...

Tiuperiode tre grava estis niagrupa aktiva partopreno enkadre de la universitata komsomola organizaĵo, plejparte en organizo de studenta Klubo de Internacia Amikeco (KIA). Pro iniciato de la komsomola komitato (kies membro estis ankaŭ VS) kaj la universitata katedro de fremdlingvoj ĝis fino de 1974 oni fondis KIA de KrasŜU, en kiu funkciis tri sekcioj – anglalingva, germanlingva kaj Esperanta. Klubo de Internacia Amikeco trovis pozitivan subtenon de la partia komitato kaj la rektoro, precipe pro aktivado de Esperanto-sekcio. Studante Esperanton, la gegrupanoj paralele organizis vesperojn de internacia amikeco kaj Esperanto-ekspoziciojn, partoprenis en la festoj kaj temaj aranĝoj de KIA. En 1975 komenciĝis niaj E-vojaĝoj: februare – OSER por komencantoj (Barnaul), aprile – Erenkontiĝo en Novosibirsk, maje – OSER-24 en Mejdureĉensk, kaj somere, kiel kulmino de nia agadjara laboro, – la neforgesebla SEJT-17 apud Ustj-Kamenogorsk! Grave estas, ke ni konstante informis pri agado de E-sekcio en ĵurnaloj: la universitata – “Universitetskaja ĵiznj” (tie estis regula rubriko “Po meridianam esperanto [Laŭ meridianoj de Esperanto]”) kaj la regionaj – “Krasnojarskij komsomolec” kaj “Krasnojarskij raboĉij”. Ni ĉiunmonate faris ankaŭ ruslingvan propagandan murgazeton, kiun ni aroge titolis “Heroldo de Esperanto”! Kaj ĝi havis veran sukceson! Grandega laboro! Sed estis tiuj, kiuj ĝin plenumis!

Kun sincera animsento mi rememoras ilin, la unuajn konstruantojn de la klubo... Eljvira Andrejevna Sudareva – instruistino de angla lingvo, memstare ekposedis Esperanton kaj multe helpis en organizo de E-sekcio kaj KIA. Gestudentoj de la universitato: Oljga Semjonova, Vera Lisenko, Irina Stepanova, Galina Cvetkova, Natalja Sadakova – biologistinoj; Natalja Trofimova, Nadja Sutugina, Galina Peškova, Jelena Blohina – kemiistinoj; Volodja Ubijennih kaj Jurij Darjanov el la fizika fakultato... Estis ankoraŭ la aliaj, kiuj entuziasme kaj optimisme trairis la unuan etapon – de la sekcio ĝis la klubo!..

Estis dum tiu memorinda 1975-a jaro unu evento, kiu konvinkis nian grupon por decido organizi Esperanto-klubon en Krasnojarsk. Mi parolas pri nia reprezenta partopreno en SEJT-17. Tien venis amasa delegacio el la fermita urbo, kun solida agadraporto kaj seriozaj ambicioj. Ni estis enamase krokodilemaj, sed laboremaj kaj instruindaj... Do, la vica SEJM-konferenco, nelonge diskutante, akceptis pozitive ne nur nian agadon, sed ankaŭ nian grupon kiel klubon-membron sen traĵo de la dumjara kandidata periodo. Jen momento, kiam ni eksentis nin kiel kolektivo, titolo de kiu estas – “Esperanto-klubo”!

Aŭtune de 1975 ni komencis serĉi aldonajn stimulojn por pluevoluigi la klubon, ĉar enkadre de la tiama universitato ni eluzis plejmulton de la eblecoj: la Esperanto-kurso transformiĝis en Esperanto-fakon de FOP



(fakultato de sociaj profesioj) kaj restis tia dum kelkaj postaj jaroj; KIA funkciis aktive kaj kunagadis kun la aliaj studentaj kluboj el kvar institutoj de la urbo, estis organizita Konsilio de la urbaj interkluboj (kie E-klubo estis la ĉefa koordinanto). Nin logis la tuturba nivelo...

Feliĉe tiuseptembre estis finkonstruita kaj malfermis siajn pordojn por urbanaro Krasnojarska urba Palaco de kulturo, kien ni venis duope kun Emilia Koĵuharj (ambaŭ membroj de la universitata komsomola komitato) por proponi organizon de E-klubo kaj kursojn sur ties bazo. La sukceso nin ne lasis, ĉar la direktorino Tamara Jakovlevna Ĥalukova (poste – Sjurbak) evidentiĝis homo sen antaŭjuĝoj kaj ne nur akceptis nin, sed eĉ donis apartan ejon! Tiam, en Sovetunio, tre nemultaj Esperanto-kluboj disponis tion... Nuntempe, interalie, – ankaŭ!.. Do, tio estis por ni granda atingo kaj ĝi nin tre stimulis al aktiva agado. Neesperantistojn, sed tamen tre bonajn homojn

kaj amikojn de la klubo, ni dum nia pli ol 40-jara vojo renkontis ofte – la sorto nin favoris! Ekzemple, Tamaran neniel tuŝis la fakto, ke la unua nia provo oficialigi la klubon kun helpo de la urba komitato de VKSM fiaskis... “Laboru kiel vi laboras, en la Palaco, – simple diris ŝi, – tutegale ili konfirmos vin!..” Kaj ĝuste tiel okazis la 24-an de novembro, en la sama 1975-a jaro!

Post 1975 Krasnojarska esperantista klubo dum pli ol tri jardekoj agis aktive, imitinde kaj neripeteble. La klubo estis publika kaj amasa; aperis kelkaj generacioj de esperantistoj kaj la reproduktado estis senhalta; oni konis nin ĉie – de la urbo ĝis la mondo; ni ne petis – ni proponis; oni estimis nin ne nur en Esperanto-medio!.. Tamen la periodon de stagno ni ne sukcesis eviti – tio okazis en 2008, kiam ni perdis la klubejon... Malbona sperto – ankaŭ estas sperto! El kelkaj centoj de la kursfinintoj kaj eksklubanoj restis pli ol kvindek... Multaj perdis la esperon kaj kredon, estas



okupitaj pri siaj aferoj kaj ne trovas lokon por Esperanto en sia vivo... Ni ne prijuĝas ilin! Dankon, ke vi estis en nia medio! Jam ĉirkaŭ dudek niaj gesamideanoj forpasis kaj neniam plu re-

venos: ili restas en nia memoro dum vivas ni! Sed restas ankoraŭ ni, kiuj ne forveturis eksterlanden kaj plezure rememoras nian vivon kaj agadon en la glora klubo. Aperis la novicoj, tiu ĉi nova generacio havas jam tipe krasnojarskajn ambiciojn, kaj tio signifas, ke la klubo daŭras!

Hodiaŭ ni ne estas disigitaj geesperantistoj de Krasnojarsk. Dank’ al pe-
noj de Lena Ŝaravina kaj Evelina Sokolova, Aljona Temerova kaj Sergeo Ĵilejkin, Rustam Karapetjan kaj Vladimir Gorn la klubo funkcias. Aparte estas menciinda nia hispana gasto kaj honora membro Rafaelo, kiu la duan jaron gvidas Esperanto-kursojn en la regiona biblioteko. Danke al tiuj ĉi homoj la klubo havas ne nur la pasinton, sed ankaŭ la estonton! Krasnojarsk revenas en Esperanto-movadon!

Vladimir Sapofnikov (Krasnojarsk)

Aleksandr Seliŝĉev

Esperanto: Tanejev kaj liaj ĉirkaŭantoj

Esperantistoj fieras, ke en iliaj vicoj estis eminenta rusa komponisto *Sergej Ivanoviĉ Tanejev (1856-1915)*. Ĉe tio ĉi oni kutime rememoris jenajn faktojn. *Unue:* Tanejev skribis esperantlingve en sia taglibro. *Due:* Tanejev kelkfoje diskutis pri Esperanto kun la granda rusa verkisto *Lev Nikolajeviĉ Tolstoj (1828-1910)*, korespondis kun *L.Zamenhof* kaj propagandis Esperanton inter siaj konatoj. *Trie:* Tanejev verkis kelkajn Esperantajn romanojn.



Sergej Ivanoviĉ Tanejev naskiĝis en la urbo Vladimir la 13-an (25-an) de novembro 1856. Lia familio apartenis al malnova nobela gento kaj sian historion konis ekde la 16-a jarcento. La pasio pri muziko ĉe Tanejev-oj estis hereda. La amatora muzikado okupis libertempon de multaj pli aĝaj reprezentantoj de la gento. La patro, Ivan Iljiĉ Tanejev, diplomiĝis en Moskva universitato laŭ tri fakultatoj: la medicina, matematika kaj lingvosciencia. Li versis. Li estis bonkora kaj honesta homo. Meze de Vladimir-aj oficistoj li estis “blanka korniko” (ne lasis sin korupti). Ivan Iljiĉ lernigis Sergeon, kaj same liajn fratojn – Vladimiron kaj Paŭlon al legado kaj skribado, al aritmetiko kaj fremdaj lingvoj. Per sia karaktero Sergej Ivanoviĉ en multaj aspektoj estis simila al la patro: bonkora, nekolerema, sed ne sangvinulo, kiel Ivan Iljiĉ, sed, pli kredeble, flegmulo. De frua infaneco kaj ĝis ŝia morto (la 6-an (la 19-an) de junio 1910) Sergeon Tanejev flegadis lia vartistino, *Pelageja Vasiljevna Ĉiĵova*.

En 1866 la familio transloĝiĝis en Moskvon. Oni sendis Sergeon en gimnazion, kiun post iom da tempo li devis forlasi. Samtempe li estis akceptita kiel lernanto en ĵus malfermiĝintan Moskvan konservatorion. Ĝia direktoro (en la aĝo de 31 jaroj) iĝis *Nikolaj Grigorjeviĉ Rubinŝtejn (1835-1881)*. Estas interese, ke la unua rusia konservatorio estis fondita en 1862 en Peterburgo, kaj ĝia direktoro estis la pli aĝa frato de Nikolaj – *Anton Grigorjeviĉ Rubinŝtejn (1829-1894)*.

Tanejev studis ne nur ĉe N.G.Rubinŝtejn, sed ankaŭ ĉe *Pjotr Iljiĉ Ĉajkovskij (1840-1893)*, kaj estis la ŝatata lernanto de la granda rusa komponisto. En majo 1875 li brile diplomiĝis en la konservatorio laŭ du fakul-

tatoj: fortepiana kaj komponista. Tanejev estis la unua ormedalulo de Moskva konservatorio. En 1876 li vojaĝis tra Rusio, poste – en Parizon. Tie li renkontiĝis kun eminenta verkisto *Ivan Sergejeviĉ Turgenev (1818-1883)* kaj *Pauline Viardot (1821-1910)*. Turgenev aĝis 58 jarojn, Tanejev – 20, sed tamen ili amikiĝis.

Ekde 1878 Tanejev estas profesoro de Moskva konservatorio anstataŭ la demisiinta Ĉajkovskij, kaj en majo 1885 estis elektita kiel ĝia direktoro. Tamen en marto 1889 li libervole eksiĝis. En aprilo 1915 mortis lernanto de Tanejev, brila komponisto *Aleksandr Nikolajevič Skrjabin (1871/1872 – 1915)*. Tanejev malvarmumis dum lia enterigo kaj baldaŭ mortis mem.

Ŝajne, la plej detalan rememoron pri Tanejev lasis lia lernanto *Leonid Leonidoviĉ Sabanejev (1881-1968)*, rusa muzikologo, komponisto kaj muzika kritikisto. Lia libro (196 paĝoj) nomiĝis “Rememoroj pri Tanejev”. Malsupre ni donas la plej interesajn (rilate al Esperanto) ekstraktojn el tiu ĉi libro kaj el alia libro de Sabanejev – “Rememoroj pri Rusio”.



Antaŭ ĉio, por ĉiuj, konantaj Tanejev, – skribis Sabanejev, – estis sufiĉe klare, ke tiu ĉi homo, timema kaj senkuraĝa, mallerta kaj korpulenta, kun aspekto de universitata profesoro (sed tute ne artisto), delikata kaj mildanima, distriĝema kaj infanece naiva en ĉiutagaj aferoj, konvikita fraŭlo, timinta junajn virinojn, principa ĝis ridindeco, ĝis karikaturo, kun preskaŭ hipertrofiita sento de honoro kaj konscienco, abstinulo, sed ŝatanto de dolĉa kaj bongusta manĝo, kun menso raciĥava kaj senverve-skeptika. ... li pleje ŝatis ludi orgenajn fugojn de Bach, malmulte luditajn tiam lastajn sonatojn de Beethoven kaj proprajn verkojn, ankaŭ senvervaj kaj akademiecajn. Tanejev, kiel kato, alligiĝis ne tiom al homoj kiom al hejmoj. Senfine delikata persono, li eĉ al hundoj diris “Vi”.

Eble malpli brila kiel muzikisto kaj kiel kreinto en la medio de rusaj komponistoj, ol multaj, Tanejev pli ol multaj imponas per sia personeco. Eblas eĉ diri, ke tio ĉi estis siaspeca “morala” geniulo. Se Tanejev, storkulo kaj rezoluta persono laŭ naturo, decidis ion, li tion jam faris – por li la vorto kaj la ago estis nedisigeblaj. Tanejev instruis aliajn. Kaj li mem konstante kaj persiste instruiĝis: li starigis por si celon kaj planon – kaj plenumis la unuan kaj la alian. En decembro 1894 Sergej Ivanoviĉ ekhavis novan ŝatokupon: tio ĉi estis nur antaŭnelonge “elpensita” kaj aperinta internacia lingvo Esperanto. La racia kaj pozitiva Tanejev sincere ekkredis je

Esperanto kiel internacia, komuna por la homaro lingvo. Li aĉetis gramatiklibron kaj komencis studi ĝin kun tiu kutima konscienco, kiu distingas ĉiujn liajn agojn kaj agadojn.

– Ni imagu, li diris, ĝis kia grado tio ĉi estas simpla: nula gramatiko, nulaj esceptoj, eĉ tiaj, kiaj konfirmas regulon.

– Kaj poste, – li aldonis, – tio estas tre muzika, belsona lingvo.

Estis decidite formi inter ni esperantistan rondeton. Ankaŭ ni, mi kaj la frato, Boris Leonidoviĉ (1880-1917), komencis lerni novan lingvon. Kiel mi klare memoras, tio ĉi okazis en antaŭtago de la Nova [1895] jaro. En nia granda kaj vasta, sed malmulte gemuta (“simila al oficejo”, kiel spritis Sergej Ivanoviĉ) loĝejo la kamenoj difektiĝis, kaj ni estis devigitaj kaŝiĝi en lasta ĉambro, kaj pro kontraŭvola nenifarado decidis “ellerni novan lingvon”. Ĝi estis ellernita vere fulmrapide: post tri horoj mi kaj la frato jam parolis kaj skribis Esperante. Estis decidite senprokraste sendi al Sergej Ivanoviĉ gratulon jam en la nova lingvo. Ni, tamen, malvarmiĝis al Esperanto tre rapide – same rapide kiel ekposedis ĝin. Sed la persista Tanejev daŭre okupiĝis pri Esperanto, studis literaturon. La 30-an de januaro li alportis al mi kaj la frato verkitan de li romancon je la vortoj de Lermontov en Esperanta traduko – “Se premas min dolore”. Tio ĉi estis donaco por la frato en la naskiĝtago, li iĝis dekkvinjara.

Sergej Ivanoviĉ verkis kelkajn komponaĵojn por Esperantaj tekstoj – la granda parto de ili ne nur restis nepresita, sed eĉ perdiĝis en liaj paperoj¹. Inter ili mi memoras romancon de drama, krepuska karaktero por baso laŭ vortoj “Sonoriloj de vespero”, kelkajn ĥoraĵojn, kaj verkitan de li por ni – responde al nia “kontrapunkta epistolo” al Pasko – dekduvoĉan senfinan kanonon por tri ĥoroj. La unua ĥoro kantis: “Mi ricevis vian leteron”. La dua – “Kontrapunktoj viaj multe bonaj”. Kaj la tria, per malrapidaj solidaj notoj: “Mi vin dankas”. Sergej Ivanoviĉ mem alportis al ni tiun ĉi kanonon, mem ludis ĝin plane kaj kantis por tria ĥoro, komike-morne elparoladis: “Mi vin dankas”, – kaj mem estis tre kontenta.

Dum konstanta procezo de memedukado de Tanejev sufiĉe granda parto apartenas al fremdlingvoj. En konservatorio oni tre bone instruis la francan kaj germanan, kaj tiujn du lingvojn li libere uzadis dum sia vivo. La notoj de Tanejev dum somero 1895 atestas pri lia lernado de la itala kun Kursinskij kaj kun la filino de verkisto L.N.Tolstoj. Dum somero 1896 sub gvido de unu el la fratinoj Maslov Tanejev komencis studi la anglan lingvon. Li provis lerni la hispanan.

¹ En nia tempo esperantisto Edgard Arutjunoviĉ Budagjan okupiĝis pri serĉado de la muzika-esperanta heredaĵo de Tanejev, sed senrezulte.

Esperanto por Tanejev estis siaspeca ŝoko. La pruvo por tio ĉi estas la fakto, ke Tanejev komencis skribi sian personan taglibron Esperante. Tiam li aĝis jam 38 jarojn: matura homo, multon pripensinta, kun formiĝintaj opinioj, solida vivosperto. Post morto de P.I.Ĉajkovskij en 1893 li iĝis la centra figuro de muzika Moskvo.


Tanejev korespondis kun *L.Zamenhof* (la leteroj de Zamenhof konserviĝas en CŜALA¹, fonduso 880, inventaro 1, unuo de konservado 239) kaj kun kelkaj personoj, kiuj okupiĝis pri tiu ĉi lingvo, – *I.Buŝera*, *A.Aleksejev*, *A.Borovko*, *G.Slucki*, *E.Ŝekkel* kaj aliaj (iliaj leteroj troviĝas en CŜALA, f. 880, inv. 1, uk. 81, 130, 145, 466, 567). Pri Esperanto interesiĝis en proksimo al Tanejev rondo *Modest Iljiĉ Ĉajkovskij*², *Maslov-oj*, *Inna Borisovna Gausman* (ŝiaj leteroj samloke, uk. 181).

En la persona biblioteko de Tanejev (ŜDMĈ)³ troviĝas kompleto de Esperanta gazeto “*Esperantisto*” (Grodno), eldonita ekde 1890 ĝis 1895. Kaj pli malfrue, post malpermeso en Rusio – “*Lingvo Internacia*” (Uppsala, Svedio) – eldonaĵo de Klubo de Esperantistoj. E-abonantoj estis ankaŭ *I.B.Gausman*, *Jurij Nikolajevič Pomerancev* kaj aliaj konatoj de Tanejev.

El la taglibro de Tanejev. Tanejev skribis sian taglibron Esperante ekde 21.12.1894 ĝis 28.06.1895. Ni citu bazajn dirojn de la aŭtoro, rilatantajn rekte al Esperanto.

Moskvo. 21.12.1894. Merkredo. Por praktiko en internacia lingvo mi havas intencon skribi la taglibron en tiu ĉi lingvo (...) Mi iris al Maslovoj, donis kaŝi papermonon al Fiodoro Ivanoviĉ kaj skribis por Anna Ivanovna leteron esperante, adresitan al Inna Borisovna.

26.12.1894. Lundo. Mi alvenis al Peterburgo. Kiam mi veturis el Moskvo, mi renkontis en vagono R.M.Feldŝtejn-on⁴. Ŝi veturis al Klin. Mi



¹ Centra Ŝtata Arkivo de Literaturo kaj Arto.

² Modest Iljiĉ Ĉajkovskij (1850-1916), dramaturgo, interpretisto, literatura kritikisto, malpli aĝa frato de Pjotr Iljiĉ Ĉajkovskij.

³ Ŝtata Domo-Muzeo de P.I.Ĉajkovskij (la urbo Klin).

⁴ Raŝelj Mironovna Feldŝtejn (1863-1928), rusa verkistino, dramaturgino. Al ŝi estis dediĉita la versaĵo de fama poeto Maksimilian Voloŝin (1877-1932) “Mi mense eniris en vian kabineton”, kiu estis muzikigita kaj malfermis la famegan albumon de David Tuhmanov “Laŭ ondo de mia memoro” (1976).

rekomendis al ŝi Esperanton. Ŝi esprimis deziron eklerni ĝin. En Klin mi renkontis ĉiujn miajn nevojn kaj nevinojn kun Inna Borisovna kaj V.C.Ŝĉelkan¹. Ili ĉiuj intencis lerni internacian lingvon.

Moskvo. 31.12.1894. Sabato. Mi venis hejmen, tagmanĝis, en 9 horoj iris promeni, ludis [pianon] kaj ekskribis leterojn al esperantistoj. La horloĝo batis la dek du kiam mi skribis.

Moskvo. 01.01.1895. Dimanĉo. Ĝis 7 horoj mi restis hejme. Ekskribis 11 leterojn al diversaj esperantistoj.

Moskvo. 10.01.1895. Mardo. Mi trovis leteron el Ziloti (li forveturis en Antverpenon); el Sabaneev-oj esperante.²

Moskvo. 18.01.1895. Merkredo. Mi ricevis leteron el Boriso Sabanejev, lia frato Leonido estas malsana. Mi skribis leteron esperante al Peĉnikov.³

Moskvo. 30.01.1895. Lundo. Mi vizitadis Maslov-ojn. Anna Ivanovna revenis el Rjazanj. Mi skribis leteron esperante al Inna Borisovna kaj same al ŝi por Anna Ivanovna kaj Julia Afanasjevna.

Moskvo. 19.02.1895. Sabato. Mi inrerparolis kun P.A.Pabst⁴ pri internacia lingvo.

Moskvo 02.03.1895. Ĵaŭdo. Mi vizitis Maslov-ojn, tralegis ĉe ili la scenon ĉe fontano el “Boriso Godunov” esperante.

Moskvo. 11.04.1895. Mardo. Mi ricevis leteron, ke “Esperantisto” estis malpermesita per cenzuro.

Moskvo. 29.04.1895. Sabato. Vespere mi estis ĉe Leo Nikolajeviĉ [Tolstoj]. Ni paroladis pri la malpermeso de gazeto “Esperantisto”. L.N. diris, ke li volas klopodi pri ekpermeso de la gazeto, por ke ĝin eldonu “Posrednik” (“Peranto”).

Moskvo. 02.05.1895. Mardo. Reveninte hejmen, mi trovis Juŝon⁵ kaj

¹ Vasilij Sergejeviĉ Ŝĉelkan (1871-1943).

² La letero de B.L. kaj L.L. Sabanejev-oj de 31.12.1894 – ili skribas, ke ricevis de Tanejev ekzempleron de gramatiko de Esperanto (CŜALA, f. 880b, op. 1. uk. 439, l. 1-20).

³ Peĉnikov Aleksandr Abramoviĉ (1873-1949), rusia violonisto. Diplomiĝis en Moskva konservatorio (1891). Multe koncertis en Eŭropo kaj Ameriko ekde 1895. En 1913-1921 jaroj li estis profesoro de Munkena supera muzika lernejo. Ekde 1936 li loĝis kaj instruis en Argentino.

⁴ Pabst Pavel Avgustoviĉ (1854-1897), rusia komponisto kaj pianisto, muzika pedagogo. Estis amiko de P.I.Ĉajkovskij.

⁵ Jurij Nikolajeviĉ Pomerancev (1878-1933), dirigento. Komponis sub gvido de Tanejev. En 1921 li elmigris. J.N.Pomerancev lasis rememorojn, aparte pri Tanejev: *Posedante ekde juna aĝo la francan kaj la germanan, Sergej Ivanoviĉ komencis studon de la angla kaj tre interesiĝis pri provoj de kreado de internacia*

Ĵilajev-on. La lasta estas tre klerita. Li scias geografion kaj la anglan lingvon.



Jasnaja poljana. Tanejev ŝakludas kun L.N.Tolstoj

Jasnaja poljana. 08.06.1895. Ĵaŭdo. Mi studis kun Aleksandro, Antono kaj Andreo Leoviĉoj [filoj de Leo Tolstoj] la italan lingvon.

Jasnaja poljana. 09.06.1895. Vendredo. Mi paroladis kun [A.P.] Peĉkovskij esperante.

Jasnaja poljana. 20.06.1895. Merkredo. Matene estis esperantisto

lingvo. Li posedis sufiĉe libere Esperanton, estis membro de Internacia societo de Esperantistoj, abonis bibliotekon en tiu lingvo, paroladis Esperante kaj ĉiamaniere perfektigis. En 1896, dum tagoj de kronada triumfo, alvenis al li korespondanto de iu sveda gazeto, kiu posedis nur sian lingvon kaj Esperanton, kaj petis lin, kiel moskvan membron de societo de esperantistoj, helpi lin. Sergej Ivanoviĉ alvokis min por helpo, kaj ni dum unu aŭ du tagoj akompanis lin laŭ Moskvo kaj, kiom permesis al ni la lingvoscio, montradis kaj eksplikis al li ĉion, kio interesis lin. La lasta lingvo, pri kiu interesiĝis Sergej Ivanoviĉ, estis la itala; li studis ĝin kun speciala celo – tralegi originale la tekston de “Donjuano” de Mozart. (Pomerancev J. El rememoroj pri S.I.Tanejev //Muzikaljnij sovremennik, aprilo, 1916)

[A.P.] Pečkovskij el redakcio de “Posrednik”, kun kiu mi parolis esperante.

Jasnaja poljana. 22.06.1895. Ĵaŭdo. Esperantisto kaj tolstojano [A.P.] Pečkovskij veturis al Kozlova Zaseko¹, por vojaĝi en Siberion.

Jasnaja poljana. 29.06.1895. Ĵaŭdo. Mi komencas gvidi mian taglibron ruse. Per Esperanto mi skribis sufiĉe – ½ da jaro. Ĉe lernado de la italia lingvo Esperanto iafoje konfuzigas per simileco de vortoj.

Moskvo. 10.01.1896. Merkredo. Mi ricevis de Zamenhof leteron kaj 36 esperantajn boŝurojn [en persona biblioteko de Tanejev estas multaj libroj, esperantaj broŝuroj, eldonitaj dum 1889-1896].

Moskvo. 31.01.1896. Mardo. Naskiĝtago de Boriso. Mi verkis al li esperantan romancon “Se premas min dolore” («В минуту жизни трудную»). Kun Sabanejev-oj kaj Juŝo ni paŝis al koncerto de Hoffmann.

Jasnaja poljana. 10.01.1896. Lundo. La duan fojon baniĝis kun Saĉjo Bers². Mi instruis lin per esperanta gramatiko.

Jasnaja poljana. 11.01.1896. Mardo. Miĉjo ekinteresiĝis pri esperanta gramatiko.

Jasnaja poljana. 12.01.1896. Merkredo. Paŝante al banado kun la princo kaj Saĉjo Bers, mi instruis Saĉjon pri esperantaj vortoj. Nin atingis surĉevalo Miĉjo.

La taglibroj de Tanejev en tri volumoj estis publikigitaj komence de la 1980-aj en la moskva eldonejo “Muziko”. La tradukado el Esperanto de la unua volumo (109 paĝoj) estis farita de muzikologo kaj esperantisto *Valerij Aleksejeviĉ Jeroĥin*, kiu en 1955 diplomiĝis en muzika liceo de Kuĵbiŝev (nun Samara) kaj laboris en la eldonejo “Muziko”. Laŭ la jaro de licea diplomiĝo el liceo ni povas konkludi, ke Jeroĥin naskiĝis proksimume en 1936. En 1997 li defendis dokto-



¹ Fervojstacio, la plej proksima al Jasnaja Poljana.

² Aleksandr Aleksandroviĉ Bers (1844-1921), la kuzo de Sofja Andrejevna Tolstaja, en fraŭlineco – S.A.Bers.

ran disertacion pri artologio. En 1997 estis publikigita lia libro “De Musica Instrumentalis. Germanio”, dediĉita al analizo de la germana muziko dum la jaroj 1960-1990. Esperantisteco de Jerohin rimarkeble ĉeestas sur ĝiaj paĝoj. Ekzemple, *Valerij Aleksejeviĉ* kun konsento citas jenan eldiron de komponisto kaj muzikologo *Rudolf Wagner-Regeny (1903-1969)*: “Estas necese kun tuta klareco ekkonscii, ke ankaŭ en la muzika lingvo formiĝis io simila al Esperanto. Tiu unuforma, ne premata per ŝtatlimoj tipo de muzikado konvinkas, ke teritoria aspekto en deveno de tiu aŭ alia muzikverko al ni, efektive, estas neinteresa, ĉe tio ĝi estas neinteresa ankaŭ tiam, kiam en la verko ĉeestas facile rekonata citaĵo el popolmuziko. Dum longa tempo oni supozis, ke en muzikverko devas aperi originaleco de la lando, en kiu la verko estis kreita. En tia alpaŝo al la afero esprimiĝis naciisma pensmaniero. Nuntempe, tamen, – kaj tio ĉi, laŭ mi, estas pli kaj pli klare videbla en multaj kuntekstoj – estas grava nur personeco de aŭtoro, nur ordo de individuo!”

En 2009 en sia retejo Jefim Zajdman enretigis artikolon pri Valerij Jerohin <<http://tero.su/index.php?ling=esper&raz=5>>. Ni citu la plej interesajn fragmentojn:

Tio estis antaŭlonge, en fino de la 1960-aj jaroj. Tiam mi loĝis en la apudmoskva urbo Kolomna, kie jam kelkajn jarojn agis aktiva junulara E-grupo. Mi babilis kun iu konato, kiam li subite ion rememoris kaj emocie diris:

– Mi hodiaŭ parolis en kafejo kun iu tre interesa homo. Li legis eksterlandajn gazetojn, sidante ĉe la sama tablo, kaj al mia demando, kiujn fremdajn lingvojn li posedas, nomis kelkajn.

– Do, kio vin impresis? multaj ja scias po kelkaj fremdaj lingvoj – rep-likis mi.

– Sed inter tiuj estis ankaŭ Esperanto, kaj al la demando, kiun lingvon li plej ŝatas, respondis – Esperanton. Evidentiĝis, ke li tute ne konas aliajn esperantistojn en la urbo.

Venis mia vico ekmiri. Ĉu vere en la urbo estas bona esperantisto, kiun mi ne konas? Ja mi al kutimiĝis, ke ĉiuj kolomnaj esperantistoj estas miaj lernantoj. Do, kaptinte la informon, ke la homo estas Valerij Jerohin, instruisto de muziko en la muzika lernejo, mi tuj kuris tien.

En la lernejo mi vere trovis tiun homon. Li aĝis ĉ. 35 jarojn kaj aspektis sufiĉe ordinara je la unua impresio – kun okulvitroj, kalveta, kun ventreto. Al mia demando en la rusa, ĉu li parolas Esperante, li respondis jese, ankaŭ ruse.

– Do, ĉu ni parolu? – proponis mi, ĉi-foje Esperante.

– Volonte – respondis li.

Kaj ni komencis. Mi uzis ĉiam pli kaj pli malfacilajn parolturnojn, kaj li respondis eĉ per la pli komplikaj. Ni simple ĝuis la lingvon interparolante! Tiel ni konatiĝis.


Li estis kabineta esperantisto, ne movadano. Li eĉ iam diris al mi, ke ne aktivas, ĉar Esperanto tutegele venkos sen lia helpo. Sed li estis tre aŭtoritata por mi, ĉar pri multo li estis pli sperta, eĉ pri tio, kio estis en sfero de miaj interesoj kaj inklinoj. Ekzemple, muzike mi "edukiĝis" je ĵazo, multon sciis pri ĝi. Sed evidentiĝis, ke li estas faka specialisto pri ĵazo.

Dekomence detalojn pri lia esperantistiĝo. Li rememoris, ke en 1956, baldaŭ post la nokta raporto de Nikita Ĥruŝčov pri la "kulto de personeco", li ekvidis en la konservatoria biblioteko gazetan artikolon, en kiu estis mencio pri Esperanto lige kun la okazonta Festivalo. Strange – ekpensis li – la lingvo aperis antaŭ 70 jaroj, sed mi neniam aŭdis pri ĝi. Li tuj vizitis la ŝtatan bibliotekon, trovis iun antaŭrevolucionan E-lernolibron kaj reskribis ĝin plene, kun la vortaro. Preskaŭ samtempe en apuda brokantejo li trovis dikan "Fundamentan Krestomation" kaj parkerigis ĝin. Tiamaniere li ekposedis la lingvon. Tiutempe li sciis krome nur la germanan.

Restas nur aldoni, ke Valerij nun estas gvida scienca laboranto de la ŝtata Instituto pri artscienco. Interesa fakto: kiam la eldonejo "Muziko", kie li estis redaktoro, okupiĝis pri eldono de 3-voluma taglibro de Tanejev kaj alportis al li tradukon de la Esperanta parto, li ekvidis sian laboron, plenumitan en juneco.

Tanejev kaj lia lernanto Nikolaj Sergejeviĉ Ĵiljajev (1881-1938). La 30-an de aprilo 1895 jaro en taglibro de Tanejev aperis enskribaĵo pri tio, ke Varvara Pavlovna Ĵiljajeva alkondukis por montri al Sergej Ivanoviĉ sian filon Nikolaon. De tiu tempo Nikolaj iĝis unu el ŝatataj lernantoj de eminenta komponisto.

Ĉar Nikolaj estis el malriĉa familio, Sergej Ivanoviĉ zorgis pri vestaĵoj de la knabo, invitis lin hejmen por tagmanĝoj, pagis stipendion, donis senpagajn privatajn lecionojn. La edzino de Lev Nikolajevič Tolstoj, Sofja Andrejevna, pagis al li 30 rublojn ĉiumonate, donacis violonon. Nikolaj tre ŝatis muzikon de *Edvard Grieg* (1843-1907) kaj en 1904 li vizitis la komponiston en Norvegio. Nikolaj donis lecionojn de muziko al filoj de *L.N.Tolstoj*. Sub la influo de Tanejev Nikolaj Ĵiljajev ellernis Esperanton. Konservigis unu el la leteroj de Nikolaj al sia instruisto en Esperanto:



5 Julio de 1899 jaro, Moskvo. Multestimata Sergej Ivanoviĉ, mia patrino kaj mi gratulas Vin kun tago de Via Anĝelo kaj deziras al Vi ĉion la plej bonan. Pelageja Vasiljevna ankaŭ gratulas Vin. Mi estis ĉe S.Blocko kaj demandis pri Vian selo [por biciklo – A.S.]; oni diras al mi ke oni sendis ĝin jam en mezo de Junio. La du libretojn de Sinjoro Aŭtoro mi sendis al Vi hodiaŭ. Mi veturos en vendredo (пятница) al Graf Sergej Ljvoviĉ. Kun profunda respekto N.S.Ĵiljajev.

P.S. Mi petas Vin saluti al Sinjoroj Maslovoj.

En 1911 pere de Tanejev Nikolaj Ĵiljajev konatiĝis kun la familio de la estonta marŝalo Miĥail Nikolajevič Tuĥaĉevskij (1893-1937). Ili rapide amikiĝis. Dum la intercivitana milito Nikolaj estis ĉe Tuĥaĉevskij; li estis la sekretario de la militestro, muzika instruisto kaj simple bona amiko.

Post la intercivitana milito Ĵiljajev instruis en Moskva konservatorio, kie li estis tre estimata, malgraŭ sia malpacema karaktero. La amikeco kun Tuĥaĉevskij iĝis fatala: la 22-an de majo 1937 Tuĥaĉevskij estis arestita kaj la 11-an de junio – pafekzekutita. La 3-an de novembro lige kun la proceso de Tuĥaĉevskij Ĵiljajev estis arestita, kaj la 20-an de januaro 1938 – pafekzekutita.

La reprezalioj kaŭzis neniigan perdon al E-movado en USSR. Nur post 20 jaroj, en 1957 la internacia lingvo estis “rehabilitita”. Sed ankaŭ dum sekvintaj jaroj la aŭtoritatoj ne favoris ĝin.

Muzikologoj opinias, ke *Sergej Ivanoviĉ Tanejev* estas komponisto de “la dua vico”. Malvero: jam dum monato ĉiutage mi aŭskultas lian operon “Oresteja”. Pli bonan operon mi ne konas.

TILE-9

La 30-an de oktobro – la 7-an de novembro 2015 en Soĉi sukcese pasis Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto (TILE-9).

La aranĝon partoprenis 30 E-istoj el 12 urboj: Soĉi (9), Jalta (6), Uljanovsk (3), Taganrog, Vladimir, Volgodonsk (po 2), Arĥangeljsk, Tomsk, Moskvo, Krasnodar, Gelengik, Brjansk (po 1).

En la programo okazis ronda tablo pri E-agado en Rusio, prelego de Jefim Zajdman pri la stato de Krimeo antaŭ kaj post ĝia aliĝo al Rusio, metiejo de Jefim Zajdman pri produktado de artaĵoj el ŝtonoj, renkontiĝo kun lokaj bardoj, vizitoj al la muzeo de Nikolao Ostrovskij, al la arta kaj historia muzeoj, al filio de Rusa Geografia Societo kun ĝia minerala muzeo, al Arbo de Amikeco, al Parko Rivjera, al la orgena halo, al koloraj fontanoj, ekskursoj al Roza Ĥutor/Krasnaja Poljana, al la Olimpika Parko, al la taksusa-buksa parko, al Nuksaj akvofaloj, partopreno en la mitingo okaze de la 98-a datreveno de Granda Oktobra Revolucio la 7-an de novembro.

Plej bone impresis la partoprenintojn la solenaj malfermo kaj fermo de la aranĝo, multaj promenoj en la urbo tage kaj nokte, kiujn gvidis nelacigeblaj soĉiaj esperantistinoj Irina Poliŝĉuk kaj Larisa Soničeva. Vadim Solovjov el Vladimir sonigis variajn registraĵojn de E-kantoj al la partoprenantoj, mem gitarludis kaj kantigis la esperantistojn en Esperanto. Vladimir Minin instruis preferancon, grandan kaj tablan tenisojn al partoprenantoj kaj praktikis kun ili tiujn ludojn.

(esperanto-rus-informoj)

45-A INTERNACIA INFANA KONGRESETO INVITAS!

Lige kun la 101-a UK en Nitro (la 23-an – 30-an de julio 2016) okazos samtempe ankaŭ la 45-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) en norda Nitro. Ĝia temo estas “Bestoj”: ja ĝi okazos en bestokuracista lernejo, kun tre favoraj prezoj por manĝoj kaj loĝigo. Junaj infanoj povus dormi kun siaj gepatroj.



La kongreseton gvidos plurlanda teamo, kies membroj – kiel instruistoj kaj gepatroj – kutimas zorgi pri infanoj kaj adoleskantoj. La programo celas amuzi ĉiujn kaj instigi daŭre paroli Esperanton. Okazos ludoj, ekskursoj, manlaboroj, sportaj aktivajoj kaj nepre Esperanto-kursoj; vespere bivakfajro, diskoteko, tabloludoj kaj voĉlegado de libroj. Bonvenas helpantoj kiuj spertas zorgi pri specifaj programeroj.

Rete ĉe <<http://bertosch.free.fr/iik2016/index.htm>> jam troviĝas informoj kun prezoj, fotoj de la kongresejo, provizoraj programo kaj skipo. En la aliĝilo oni indiku siajn ideojn, hobiajn kaj kontribuojn al la programo. Indas aliĝi plej frue, antaŭ la fino de la unua aliĝperiodo!

Gazetaraj Komunikoj de UEA

10-JARIĜO DE E@I: PROJEKTOJ, DEFIOJ, SUKCESOJ

Antaŭ dek jaroj, la 14-an de novembro 2005 en Slovakio estis oficiale registrita internacia neregistara organizo “E@I” (tiam: *Edukado@Interreto*), antaŭe funkciinta kiel neoficiala laborgrupo.

Dum la unua jardeko E@I montris sin en pluraj sferoj, ekzemple: dek Someraj Esperanto-Studadoj (SES), tri konferencoj KAEST, pluraj libroj kaj diskoj, retprojektoj, oficejo, volontulado k.m.a. Okaze de la dekjariĝo en la kvartalo Demänová de la Slovacia urbo Liptovský Mikuláš la 14-an de novembro ĉi-jara okazis gaja festo en junulara Esperanto-etoso.

Jen eta superrigardo pri la agado de E@I ekde ties komenco ĝis nun (la 14-a de novembro 2015), omaĝe al la 10-jariĝo de la fondo de la organizo kiel memstara neregistara organizaĵo, surbaze de la blogo de E@I kaj artikolo en *La Ondo de Esperanto*.



Historio skize

1999 – fondo de neoficiala laborgrupo “Esperanto@Interreto” (E@I)

2000 – unua trejnseminario

2002 – lanĉo de <lernu.net>

2005 – (14.11) – oficiale agnoskita internacia neregistara organizo (en Slovakio): E@I (*Edukado@Interreto*)

2007 – la unua SES (Pribylina, Slovakio)

2009 – la unua EU-projekto: retejo <slovake.eu> (peresperanta, ne poresperanta projekto)

2010 – la unua staĝanto per la programo *Erasmus*

2010 – la unua KAEST, organizita de E@I

2011 – propra oficejo en Partizánske

(2013 – ŝanĝo de la oficejo al pli granda)

2013 – la unua volontulo per EVS

2015 – la 10-a SES (Martin, Slovakio)

La agado de E@I konsistas el kelkaj partoj, foje forte ligitaj, foje tute sendependaj. La projektojn kaj la agadon eblas dividi al: organizado de aranĝoj, kreado de edukaj retejoj, eldona agado, ceteraĵoj. Jen eta superrigardo de ili, dividitaj al unuopaj kategorioj.



Aranĝoj

E@I-seminarioj

Inter la jaroj 2000 – 2006 okazis entute ok trejnseminarioj, kiuj signife influis la organizon. Precipe en la unuaj jaroj de la funkciado de E@I, trejnseminarioj pri temoj rilataj al edukado kaj Interreto havis gravan rolon en la disvolviĝo de la asocio kaj trovado de novaj aktivuloj. En la tempo, kiam E@I estis faka sekcio de TEJO, ĝiaj seminarioj estis samtempe ankaŭ TEJO-seminarioj.

SES

Ekde 2007 ĝis 2015 okazis jam 10-foje la Somera Esperanto-Studado (en 2014 ĝi okazis eĉ dufoje, unu en Slovakio, alia en Rusio). Ĝi iĝis relative rapide la plej granda somera E-lernejo tutmonde (kun proksimume 200-250 partoprenantoj el ĉ. 20 landoj).

KAEST

KAEST – Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (2010, 2012, 2014). En novembro 2010 unuafoje sub gvido de E@I en Modra okazis la konferenco pri faka uzo de Esperanto KAEST, aranĝo kun tradicio en Ĉeĥoslovakio ekde 1978, kies organizadon E@I transprenis de KAVA-PECH. La aranĝo okazas ĉiun paran jaron novembre, en la urbeto Modra.



SAT-kongreso

La teamo de E@I helpis okazigi la SAT-kongreson en la urbo Nitra en 2015.

Kun SAT ĝi kunlaboris ankaŭ pri la kreo de la reta versio de PIV (retejo <vortaro.net>).

UK 2016

E@I ankaŭ aktive partoprenas en la organizado de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos julie 2016 en Nitro, Slovakio.

Lingva kafejo (Jazyková kaviareň Partizánske)

Ĉiumonate okazigas E@I kaj ties volontuloj en “Kinobar IVA”, Partizánske t.n. Lingvan kafejon – unu vesperon kun eblo paroli en diversaj lingvoj ĉe apartaj tabloj. Kompreneble Esperanto-tablo ankaŭ ĉeestas.

Eldonaĵoj

E@I eldonis plurajn verkojn, ofte kunlabore kun la slovaka eldonejo

Espero. La eldonaĵoj aperis komence kiel flanka okupo, kiun ofte instigis la uzantoj de retaj projektoj de E@I (ekz. *lernu!-KD* kaj *Komputeke*-libro). Same plej multaj eldonaĵoj estas rezulto de reta kunlaboro de internacia teamo. Tamen la eldona fako de E@I iĝas pli kaj pli populara kaj en estonteco daŭre kreskos.

La unua libro aperis en 2005. Temas pri *Manlibro pri instruado de Esperanto* – libro eldonita kune kun ILEI, sub la redaktora gvido de Katalin Kováts. Kontribuis al ĝi 13 aŭtoroj. (Aperis jam 3 eldonoj.) La verko estas rezulto de la projekto “Flugiloj de Malfacila Vento” kaj uzita dum ĝiaj seminarioj kiel instrulibro.


Pri Vikipedio E@I realigis du verkojn: *Vikipedio – praktika manlibro* (en 2005) kaj *Vikipedio por vi* (en 2008), detala verko, kiu klarigas la fenomenon Vikipedio kun multaj konsiloj, klarigoj kaj paŝo post paŝo gvidas la leganton por iĝi facile ne nur uzanto de tiu reta enciklopedio sed ĝia aktiva kontribuanto.

En 2008 aperis la unua terminaro prikomputila, *Komputeke*. Ĉar ĝi rapide elvendiĝis, en 2012 aperis la dua eldono, ampleksigita.

Ekde la jaro 2010 E@I transprenis la organizadon de KAEST. Tial ankaŭ E@I ekeldonis la *KAEST-prelegokolektojn* en 2011, 2013 kaj 2015.

Cetere sub la marko de E@I aperis (en 2010) “lernu!-gramatiko” – la libro *Detala gramatiko de Esperanto* – nova verko de Bertilo Wennergren, la aŭtoro de PMEG, ĝi baze estas mallongigo de PMEG kun parte aliaj gramatikterminoj. En 2013 aperis lernolibro de la minimumisma lingvo *tokipono*, lernebla per Esperanto (kiu cetere estis entute la unua papera lernolibro de tiu ĉi lingveto).

De la diskoj estus certe menciindaj eĉ ĉiuj, ĉar ĉiu el ili estas iaspeca unikaĵo en la E-movado kaj eĉ ekster ĝi. La KD *Esperanto* estis produktita en 2008, danke al la kunlaboro de E@I kaj urbo Bjalistoko aperis la disko en la pola tagĵurnalo *Gazeta Wyborcza* – ĝis nun temas pri la plej multnombra E-eldonaĵo elektronika. La kompakta disko kun simpla nomo *Esperanto* estis eldonita en 400 000 ekzempleroj. La disko estas dulingva (pole kaj Esperante) kaj celas prezenti Esperanton al ĝenerala publiko per luda, amuza formo.



Diskoj eldonitaj de E@I

La DVD *Esperanto elektronike* estas la plej ampleksa kaj la plej bunta kompleta materialo pri la internacia lingvo Esperanto. Ĝi celas du publikojn: al esperantistoj ĝi donas amason da interesaj E-materialoj (libroj, artikoloj, muziko...), al neesperantistoj ĝi liveras informojn pri Esperanto, kursojn, vortarojn... Aperis kvar eldonoj de la furora disko, ĝi komunikas enhavon en 26 lingvoj. La lasta eldono estis la plej ampleksa, kun multaj novaj fotoj, libroj, kantoj, gazetoj, ktp. La kompleta enhavo de tiu ĉi disko aperas nun ankaŭ senpage rete ĉe <<http://dvd.ikso.net>>.

La DVD-video *Esperanto estas...* estas moderna inform-filmo pri Esperanto, destinita por neesperantista publiko. Ĉefa celo estas prezenti Esperanton kiel vivan, modernan kaj plene funkciantan internacian lingvon kun multaj trajtoj. La filmo havas 43 minutojn kaj 6 partojn, ĉiu el ili prezentas alian aspekton de Esperanto. Entute la filmo havas voĉregistraĵojn en 10 lingvoj kaj subtekstojn en 26! La DVD-video aperis en 2 eldonoj – dividitaj laŭlingve (versioj A kaj B), ambaŭ po 2000 pecoj. La filmo spektoblas ankaŭ en YouTube.

La DVD-j *Vikipedio en Esperanto – eksterreta eldono* 2012 kaj 2014 estas interesaj kaj de la enhava kaj de la arkiva vidpunktoj. Sur la diskoj ja aperas la kompleta tiama enhavo de la E-lingva Vikipedio. Se do hazarde la reto ĉesos funkcii, la Esperanta versio de Vikipedio estos savita.

Jen la listo de la libroj, kompaktdiskoj kaj DVD-j eldonitaj de E@I:

01. KD *lernu!* (2003)
02. libro *Manlibro pri instruado de Esperanto* (2005, kunlabore kun ILEI)
03. DVD *Esperanto Elektronike* (2006, 2011)
04. libro *Vikipedio – praktika manlibro* (2007, aŭtoro Yves Nevelsteen)
05. libro *Komputeko* (2008, aŭtoro Yves Nevelsteen)
06. KD *Esperanto* (2008, 400 000 ekzempleroj aperis en *Gazeta Wyborcza* antaŭ la 94-a UK)
07. libro *Vikipedio por vi* (2008, aŭtoro Ziko van Dijk)
08. DVD-video *Esperanto estas...* (2008, reĝisoro Rogener Pavinski)
09. broŝuro *Malkovru Esperanton* (2009, iniciatita de Hokan Lundberg)
10. libro *Detala gramatiko de Esperanto* (2010, aŭtoro Bertilo Wennergren)
11. libro *Modernaj teknologioj por Esperanto* (2011, prelegkolekto de la konferenco KAEST 2010)
12. DVD *Vikipedio en Esperanto – eksterreta eldono* 2012
13. libro *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj* (2013, prelegkolekto de

la konferenco KAEST 2012)

14. DVD *Vikipedio en Esperanto – eksterreta eldono 2014*
15. libro *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon* (2015, prelegkolekto de la konferenco KAEST 2014)
16. libro *toki pona en 76 ilustritaj lecionoj* (2013, 2014; entute la unua papera lernolibro de la lingveto *toki pona*, lernebla pere de Esperanto, 2 eldonoj)
17. libro *Lingvomanio* (2015, Proverboj kaj idiomoj de 28 lingvoj de Eŭropo)

Pli da informoj pri unuopaj verkoj vi trovos en nia retejo <<http://www.ikso.net/eo/projektoj/eldonajxoj.php>>. Krom tiu ĉi agado aperas ankaŭ aliaj eldonaĵoj, rilataj al EO, foje tre popularaj. Bona ekzemplo estas la broŝuro *Malkovru Esperanton*, kiu ĝis nun aperis en 10 lingvoversioj. Tre ŝatataj estas ankaŭ diversaj Esperantaj T-ĉemizoj, kaj aliaĵoj, kiel ekz. insignoj aŭ glumarkoj.

Projektoj retaj

E@I kreis, kunkreis kaj funkciigas plurajn retpaĝarojn, kiuj rilatas al edukado en Interreto kaj havas rilaton al Esperanto aŭ lingvoj ĝenerale. Pluraj el la retpaĝaroj estas konstante prizorgataj, kelkaj funkcias sen aktiva prizorgo, kaj kelkaj estis transdonitaj al aliaj organizoj. E@I ankaŭ kiel partnero subtenas personajn iniciatojn de siaj membroj, ekzemple per disponigo de rethotela loko.

Jen la listo de unuopaj projektoj:

Esperanto: <www.lernu.net>, <www.vortaro.net>, <www.komputeko.net>, <www.bretaro.net>, <<http://dvd.ikso.net>>, <<http://drakoj.ikso.net>>, <<http://ridejo.ikso.net>>, <<http://apetito.ikso.net>>, <<http://eo55.ikso.net>>, <<http://blog.ikso.net>>, <<http://kantaro.ikso.net>>.

Aliaj lingvoj: <<http://slovake.eu>> (13 lingvoj, inkluzive de Esperanto), <<http://deutsch.info>> (15 lingvoj, inkluzive de Esperanto), <<http://tokipona.info>> (kurso kun ekzercoj, de Esperanto), <<http://speaklearn.eu>> (20 lingvoj, inkluzive de Esperanto), <<http://lingvo.info>> (21 lingvoj, inkluzive de Esperanto), <<http://mluvtecesky.net>> (5 lingvoj), <<http://espa2.eu>> (11 lingvoj).

Aliaj edukaj: <<http://monda.eu>> (10 lingvoj, inkluzive de Esperanto), <<http://cyberhelp.eu>> (8 lingvoj).

Staĝoj: De 2010 ĝis 2013 laboris en E@I entute 14 staĝantoj el 6 landoj (8 per Erasmus, 1 per Campus Hungary, 5 sen stipendio)

Volontuloj

Nome de EVS (Eŭropa Volontula Servo) E@I akceptas en sia oficejo en Partizánske volontulojn (18-30 jaraj) por labori pri diversaj projektoj. Ĝis nun estis 9 volontuloj el 9 landoj: Matthieu Desplantes (Francio), Kaan Kızılgün (Turkio), Rasmus Åkerlund (Svedio), Matthias von Laer (Germanio), Anna Liszewska (Pollando), Alberto Muzzu (Italio), Jelena Ĥusanova (Rusio), Oleh Rohalskyj (Ukrainio), Robert Nielsen (Irlando).

Aliaĵoj

Oficejo

Ekde la 1-a de julio 2011, danke al subteno de la urbo Partizánske (kaj ties urbestro Jozef Božík), E@I disponas pri propra oficejo en ĝia urbocentro. La unua oficejo havis la areon de 60 m² kaj laborlokojn por 5 personoj. En junio 2013 estis ŝanĝita loko de la oficejo ene de la sama konstruaĵo, la oficejo iĝis pli granda kun 100 m² kaj du ĉambroj. Ekde ĝia lanĉo ĉiuj stagiintoj kaj surlokaj aktivuloj de E@I komune laboras tie.

Vikipedio

Kun Vikipedio jam estas longjara kaj diversspeca kunlaboro, ekde instigo al esperantistoj verkadi, eldonado de libroj pri Eo, okazigo de konkurso, kunorganizado de trejnadoj ktp.

Kampanjoj

Foje E@I lanĉas monkolektajn kampanjojn, ĉefe kun konkreta celo, por subteni konkretan projekton. Tiel okazis por ekz. eldoni la DVD-jn (*Esperanto Elektronike*, *Esperanto estas...*), por aperigi retan version de PIV (<vortaro.net>) aŭ por helpi finance al ESF.

Gazetaro

Multfoje jam aperis diversspecaj artikoloj en Esperanto-gazetaro de E@I-teamanoj. Regule ili aperas en *La Ondo de Esperanto*, ofte en la revuo *Esperanto*, en *Libera Folio*, *Esperantisto Slovaka*, ktp. Ankaŭ pli kaj pli ofte aperas mencioj pri diversaj projektoj de E@I en neesperantista gazetaro diverslande, ĉefe lige kun la edukaj lingvo-retejoj.

Prezentoj/prelegoj

E@I kunorganizas aŭ alimaniere kontribuas al la kleriga programo de aliaj Esperanto-aranĝoj, ekzemple al la seminario *Sabla Printempo* okazanta en Ĉeĥio aŭ la renkontiĝo *Esperanta Vikimania* (okazinta en 2011 en Svitavy). Ankaŭ en la programo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto laste aperas kontribuoj de E@I (propraj prelegoj dum la 93-a UK; propra

salono dum la 94-a UK; du kontribuoj al la Kleriga Lundo kaj organizo de la Terminologia forumo dum la 96-a UK, prezentoj en la Kleriga Lundo dum la 98-a kaj 100-a UK)...

Kunlaboro

E@I tre regule kunlaboras kun diversaj organizoj, kaj Esperantaj, kaj ne-Esperantaj, por atingi siajn celojn. Tia kunlaboro foje estas longjara kaj tre vasta, kiel ekz. kun la firmao Studio Gaus, kiu nun ĉefprogramas ĉiujn grandajn edukajn projektojn, kaj ĝia posedanto, Jevgenij Gaus, ja estis antaŭe aktivulo en E@I kaj TEJO. La kunlaboro povas havi tute variajn aspekton kaj daŭron. E@I jam kunlaboris kun multegaj organizoj pri multaj projektoj, ekz. kun ILEI, EEU, TEVA, SAT, TEJO, UEA, Landaj asocioj, diversaj ne-Esperantaj organizoj, universitatoj ktp.

Subteno

Financa subteno estas daŭre unu el la plej grandaj defioj por E@I – ju pli da profesiaj projektoj kaj teamanoj, des pli multaj financoj estas bezonataj. Malfacilas foje trovi sumojn por ĉiu inda projekto, tial ofte kelkaj planoj devas atendi dum jaroj, por povi realiĝi. Kelkaj atendas ĝis nun... Se iu emus subteni la agadon de E@I, detalojn pri la subtenebloj vidu en: <<http://www.ikso.net/eo/subtenu/index.php>>. Jen du niaj plej grandaj sponsoroj:

ESF – La plej granda subtenanto de nia agado poresperanta estas sendube “Esperantic Studies Foundation”, sen kiu multaj el niaj projektoj tute ne ekzistus. Grandan dankon al ili, E@I esperas ankaŭ en la estonto proksime kunlabori! – <<http://esperantic.org/>>.

EU – Ĉiuj grandaj edukaj retejoj (krom <lernu.net>) aperis danke al la subteno de Eŭropa Komisiono kaj EU entute. Ekde 2009 E@I jam regule partoprenas projektojn, subtenitajn de EU, kaj danke al tio entute povas labori kaj antaŭenigadi siajn celojn.

Kompreneble, granda danko esprimendas ankaŭ al ĉiuj privataj donacintoj kaj ĉiuj volontuloj, kiuj dum la tuta vivodaŭro de E@I helpas al la organizo diversmaniere! Sen tiu heroa laboro de multaj homoj de la tuta mondo E@I jam certe ne ekzistus.

Konklude

Jen, la 10-jariĝo de E@I estas bona okazo sumigi ĝiajn aktivecojn kaj atingojn. Tiu ĉi artikolo celis doni almenaŭ bazan superrigardon pri diversaj kaj buntaj agadoj, pri kiuj E@I okupiĝas. Certe eblus skribi multe pli, eĉ

pri ĉiu unuopa projekto. Sed la novaj projektoj jam atendas sian realigon, do estas tempo adiaŭi kaj daŭrigi la laboron. Ĝis revido ĉe iu el la projektoj aŭ aranĝoj de E@I!

Pli da detaloj pri E@I: <www.ikso.net>,

<<https://eo.wikipedia.org/wiki/E@I>>, fotogalerioj de pluraj aranĝoj

<<http://picasaweb.google.com/esperanto666/>>.


Ret-Info

ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO FINIĜIS – ZAMENHOF OMAĜOTA

La 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finiĝis la 18-an de novembro post dusemajna laboro en la sidejo de la monda organizaĵo en Parizo. Kiel ruĝa fadeno tra ĝiaj diskutoj iris la 70-jariĝo de Unesko kaj la realigo de la Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo, sed en sia ferma parolado la Ĝenerala Direktoro s-ino Irina Bokova ne povis ne tuŝi la lastatempajn terorismajn atakojn, interalie meze de la konferenca periodo en Parizo mem: *Tiu ĉi krima perfortaĵo trafas nin ĉiujn. Ĝi atakas ĉion, kio estas plej kara al ni: liberecon, homajn rajtojn, la dignon de ĉiu homo, nian senton de aparteno al la unusama homaro.*

Por esperantistoj la plej ĝojiga decido de la Ĝenerala Konferenco estas la envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L.L.Zamenhof (la 14-a de aprilo 1917) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos “asociita” en la periodo 2016-2017. Propono pri tio estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okazo de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita unu el la grandaj personecoj de la homaro.

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan statuson ĉe Unesko ekde 1954, estis reprezentita de kvar observantoj: Renée Triolle, François Lo Jacomo, Oleksandra Kovyazina kaj Nathalie So Yun Kesler. Hazarde samtage, la 5-an de novembro, kiam estis akceptita la aŭspiciado de la Zamenhof-datreveno, UEA havis tempon ĉe la budo por neregistaraj organizaĵoj, ĉe kiu la UEA-representantoj povis disdoni informilojn kaj respondi demandojn pri Esperanto kaj la agado de UEA.



Gazetaraj Komunikoj de UEA

ESPERANTISTOJ EN ROSKILDE-FESTVALO

La Festivalo de Roskilde (RF) estas la plej granda nordeŭropa kultura kaj muzika festivalo, ekzistanta ekde 1971. Ĝi estas aranĝata de neprofita organizaĵo kun ĉirkaŭ 50 plentempaj laborantoj kaj miloj da volontuloj. Dum la Festivalo la nombro de volontuloj kreskas ĝis pli-malpli 32 miloj. La volontuloj starigas la festivalajn tendegojn, konstruas scenejojn, laboras por la sekureco de la tendaroj ktp.

Roskilde Festival Charity Society estas la organizanto de la Festivalo. La celo de tiu societo estas apogi iniciatojn, kiuj helpas infanojn kaj junulojn, kaj subteni laborojn humanan kaj kulturalan. La laboro de la societo estas sendependa de politikaj partioj kaj havas neniujn geografiajn limojn.

Dana Esperantista Junulara Organizo ekde 2007 partoprenis en RF. Tio ĉi estas unika ŝanco por amuziĝi, uzi kaj montri Esperanton al 100 000 homoj dum la tuta semajno. Ni uzos Esperanton kiel laborlingvon en profesia medio, kaj la restanta profito venas al la movado, por sekvaj festivaloj, por KEF aŭ por niaj parencaj asocioj.

Nia partopreno funkcias tiel ke ni kiel asocio deĵoras por la Festivalo, farante iun servon, utilan por RF. Kontraŭ tio niaj deĵorantoj ricevas senpage sufiĉe multekostajn enirbiletojn.

Estas multaj taskoj, kiujn eblas fari por la Festivalo. Dum la jaroj ni havis redonbudon, kontrolis brakbendojn ĉe pordegoj, patrolis en ludparko kaj havis etan manĝbudon. Ĉi-jare ni servis kiel tendaraj gardistoj: ni patrolis duope en sekcio de la grandega tendaro.

Ni invitas esperantistojn de la tuta mondo por festi kun ni kaj realigi la



revon. Tio signifas kelkajn deĵorojn, kroman helpon ekster tiuj horoj, sed ankaŭ senpagan aliron al la grandega muzikfestivalo kun famegaj artistoj, senpagan loĝadon kaj altkvalitan manĝon dum la tuta semajno, kaj ĉefe – unikan etoson kun grupo de spertaj festivalemuloj.

Mi persone partoprenis en RF jam plurfoje. La unuan fojon – kiel volontulo, kaj poste – kiel organizanto. Mi tre ŝatas ke ni ne nur festas kune, sed ankaŭ multe laboras festante. Tio donas alian specon de rilatoj inter homoj kaj pli fortan amikecon. Se vi ekinteresiĝis, vidu la detalojn ĉe <<http://roskildefestivalo.dk/>>.

Fluganta Soren – Julija Penjkova (Moskvo)

ELEKTOJ EN UEA KOMENCIĜAS

En 2016 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2016-2019. Parto de ĝi estos elekto de komitatanoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatano B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM oni elektos ses komitatanojn B.

La Ĝenerala Regularo (art. 8) difinas: *Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi unu solan kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn.*

Kompletaj proponoj atingu la Centran Oficejon de UEA (*Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando*) ĝis la 29-a de februaro 2016. Validaj estos nur skribaj dokumentoj kun originalaj subskriboj (t.e. ne telefaksoj nek retmesaĝoj).

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum du antaŭaj jaroj (t.e. 2014 kaj 2015) kaj, se elektita, resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis nenium komitatkunsidon en la periodo 2010-2015, ne estas reelektebla.

Se estos ne pli ol ses kandidatoj, ili ĉiuj estos elektitaj sen voĉdonado. Se la nombro estos pli granda, la individuaj membroj elektos ses komitatanojn B per poŝta balotado.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA

Eksciu, ke...

SERĈATA: NOVA REDAKTORO DE “ESPERANTO”

Laŭ interkonsento kun la Estraro de UEA, la nuna redaktoro de *Esperanto*, Fabrício Valle, finos sian laboron en tiu posteno per la aprila numero de la jarkolekto 2016.

Tial UEA nun invitas kandidatigojn por transpreni la redaktadon de la revuo ekde numero 2016:5. Tio signifas eklabori jam komence de aprilo 2016. La sukcesa kandidato ricevos kontrakton por finredakti la jarkolekton 2016; decido pri renovigo/plilongigo estos farita en oktobro 2016. La redaktan laboron la redaktoro faros ĉefe en sia loĝloko. Tamen estus avantaĝo se la sukcesa kandidato povus pasigi parton de aprilo en la Centra Oficejo por pli funde konatiĝi kun la atendoj kaj la informfluo ligitaj al tiu laboro.

Kandidatoj devas havi tre bonan lingvan nivelon (KER-nivelo C1), ĵurnalisman aŭ redaktan sperton, pruvitan kapablon por memstara laboro kaj bonan konon de la Esperanto-movado. La Estraro serĉas personon, kiu aktive kontribuos al efektivigo de la Strategia Laborplano de UEA, kiu estas iniciatema kaj kreema, kaj kiu interesiĝas pri plej diversaj aspektoj de la movado. La redaktopolitiko de la revuo estas proksime ligita al la mastrumado de informoj en la retejoj de UEA, kaj la redaktoro do samtempe estos ano de teamo por renovigo de tiuj retejoj.

Por kandidatiĝi oni sendu al la Ĝenerala Direktoro de UEA elektronikan dokumentaron kun jena enhavo:

- sinprezenta letero, inkluzive de la motivoj por kandidatiĝi;
- vivresumo (persona, eduka, profesia, movada);
- mallonga eseo pri la potenciala kontribuo de la revuo al efektivigo de la Strategia Laborplano, kaj pri la movada rolo de la revuo en la interreta epoko;
- nomoj kaj kontaktinformoj de tri rekomendantoj (ne nepre esperantistoj), kiuj konas la kandidaton profesie kaj/aŭ movade;
- laŭplaĉe, aliaj dokumentoj kiuj atestas la redaktajn kaj/aŭ movadajn kapablojn de la kandidato.

Surbaze de tiuj dokumentoj – kiuj atingu la CO ĝis la 31-a de januaro 2016 – oni elektos unu aŭ pliajn kandidatojn por telefona intervjuo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

MALFERMA TAGO DE ADIAŬOJ KAJ JUBILEOJ

75 partoprenantoj el 14 landoj ĉeestis la 43-an Malferman Tagon de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 28-an de novembro. Kiel tradicie, ĝin komencis Ionel Oneț per prezentado de novaĵoj de la Libroservo de UEA. Apartan prilumon ricevis la plej freŝa el ili, *Tamen ĝi moviĝas!*, la tria volumo de eseoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj, pri kiu rakontis ĝiaj redaktoroj Michela Lipari kaj Humphrey Tonkin. Jam prezentita estis ankaŭ novaĵo, kiu ankoraŭ ne aĉetebis sed baldaŭ aperos, nome la reviziita eldono de la jam klasika verko *La danĝera lingvo*, pri kiu parolis ĝia aŭtoro Ulrich Lins.

En sia lasta Malferma Tago kiel la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller unuafoje mem kontribuis al la programo montrante erojn el sia kolekto de bildkartoj pri la strato Nieuwe Binnenweg. Li komencis per bildoj pri la unua domo ĉe la placo komence de la strato, kie la Centra Oficejo ekfunkciis en 1955, kaj finis per bildoj pri la ĉirkaŭo de la nuna domo en Nieuwe Binnenweg 176.

Lige kun la 70-a datreveno de la fondo de UN, Humphrey Tonkin prelegis pri la temo *UN ĉe la sojlo de nova epoko*. Li traktis precipe la Celojn por Daŭripova Evoluigo por la periodo 2015-2030 kaj vekis viglan diskuton pri tio, kiel la Esperanto-movado kontribuu al tiu programo. La ĉeforganizanto de la 52-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en la litova Birŝtonas (la 2-an – 10-an de julio 2016), Povilas Jegorovas, parolis pri la historio de tiu aranĝo, siatempe tre grava por la sovetia movado kaj daŭre populara internacie. Barbara Pietrzak konatigis la ĉeestantojn kun la Pola RetRadio en Esperanto, kiu du-tri tagojn pli frue jubileis per la realigo de sia 500-a elsendo. Sekvis la filmo *Reveno al Finnlando* de Roman Dobrzyński pri polo, kiu dum la 2-a mondmilito kiel kaptito de la germana armeo kunkonstruis fervojon en Norda Finnlando kaj en 1990 revenis por revidi la saman lokon kaj vilaĝanojn, kiuj helpis lin. Dum la lasta horo de la programo la publiko povis fari demandojn al Osmo Buller pri lia vivo kiel esperantisto kaj oficisto de UEA.

Kun la vendosumo 2126 eŭroj la Libroservo de UEA spertis tre bonan tagon. Ne surprize pleje furoris la esearo *Tamen ĝi moviĝas!*, de kiu vendiĝis 26 ekzempleroj. Sekvis *Poŝamiko* (16), *Beletra Almanako* n-ro 24 kaj *Tuj apude* (po 12), kaj la esearo *Interlingvo inter lingvoj* (10). Entute la nuna jaro estas sukcesa por la Libroservo, ĉar en la Malferma Tago ĝiaj tutjaraj vendoj jam superis 100 000 eŭrojn, unuafoje depost 2008. Krome, du tagojn poste ĝi havis rondan jubileon, ĉar ĝi ricevis la dekmilan mendon pere de sia reta katalogo ekde la komenco en marto 2004. La mejloŝtonan

retan mendon n-ro 10 000 faris la libroservo de Dana Esperanto-Asocio, kiu ricevis pro tio donaceton.



en la Libroservo (foto: Clay Magalhães).

Gazetaraj Komunikoj de UEA

UEA ĈE UN PRI LINGVAJ RAJTOJ, UK KAJ ZAMENHOF-DATREVENO

Tri reprezentantoj de UEA: Nicole Margot, Alain Favre kaj Stefano Keller – aktivis en la oka sesio de la Minoritata Forumo de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo (la 24-an – 25-an de novembro 2015). Ĝia temo estis *Minoritatoj kaj la krimjura sistemo*.

Pluraj delegitoj de NRO-oj menciis la problemon de lingva baro, kiu kaŭzas malatenton aŭ nefakan, malprofundan traktadon de juraj kazoj koncerne minoritatajn civitanojn. La reprezentantoj de UEA interŝanĝis spertojn kaj diskutis pri kunlaborebloj kun reprezentantoj de organizaĵoj, kiuj traktis ankaŭ lingvajn problemojn en siaj alparoloj.

En la dua tago Keller intervenis pri la 4-a punkto de la tagordo: *Malfacilaĵoj de la krimjuraj sistemoj por kontentigi la bezonojn kaj postulojn de minoritatoj*. Li atentigis pri la graveco konsideri la lingvajn aspektojn de la interago kun anoj de minoritatoj, en ĉiuj situacio, nivelo kaj agtereno de la justica-polica sistemo. Kiel viktimoj de krimoj, minoritatoj ofte ne ricevas sufiĉe da atento flanke de la aŭtoritatoj, parte pro komunikaj, lingvaj malfacilaĵoj. Keller akcentis la neceson aldoni en la fina dokumento de la Forumo postulojn pri lingvaj konsideroj koncerne la tutan komunikadan procezon kun minoritatoj dum juraj traktadoj.

Memorigante pri la oficiala statuso de UEA ĉe UN kaj Unesko, Keller menciis la fakton, ke UEA ne nur subtenas la lingvajn rajtojn de minoritatoj kaj indiĝenaj popoloj, sed ankaŭ proponas solvon por la justa komunikado inter diversetnuloj: la uzon de Esperanto, la vere internacia lingvo.

En sia parolado Keller informis ankaŭ pri la 101-a UK, okazonta en julio 2016 en Nitro, Slovakio, kun la temo *Socia justeco – lingva justeco*, kiun traktos en Esperanto kongresanoj el diversaj etnoj. Ŝtata delegito de Hungario interesiĝis pri tiu evento kaj ricevis de Keller pli detalajn informojn.

Keller aparte dankis la interpretistojn kaj la servon skribo-tradukan de alparoloj disponigitan unuafoje en la Minoritata Forumo por surda partoprenanto. En la fino, parolante pri Unesko, li menciis ankaŭ ĝian asociiĝon kun la primemorado de la 100-a datreveno de la morto de Zamenhof en 2017.

La alparolteksto kaj sonregistraĵo troviĝas diverslingve en la retejo pri lingvaj rajtoj <<http://www.linguistic-rights.org/eventoj/>>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

UEA INVITAS PRELEGI EN LA IKU-SESIO EN NITRO

Kadre de la 101-a UK en Nitro okazos la 69-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU rete: <amri@huji.ac.il> aŭ paperpoŝte: *prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-7179901 Modiin, Israelo*.

La proponoj alvenu plej laste la 31-an de januaro 2016.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el la prelego kadre de IKU kaj du kromaj prelegoj. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Aparte bonvenaj estos prelegoj kun rilato al la kongresa temo *Socia justeco – lingva justeco*, sed bonvenos ankaŭ proponoj pri aliaj temoj. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝo. Proponoj kiuj ne estos elektitaj por IKU, povos tamen esti utiligitaj en aliaj kadroj.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano de la 101-a UK kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Akceptita prelego estos rekompencita per honorario 260 EUR. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU <<http://www.uea.org/kongresoj/universitato>>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

kultúra revuo



*en tradukoj
de Ludmila Novikova*

Blua nebulo kaj neĝa senlimo

Blua nebulo kaj neĝa senlimo,
 Fajna limona luna lum'.
 Kun kaŝdoloro strebas l' animo
 Al rememoro pri l' juna um'.

Neĝ' ĉe sojlo – sablo ŝutata.
Iam sub sama lunlum' sen vort',
Surfruntiginte felĉapon el kato,
Mi adiaŭis al la patra kort'.

Nun mi revenis al ter' de lulo.
Kiu memoras pri mia nom'?

Triste mi staras, pelata vagulo,
Eksa loĝanto de mia dom'.

Ĉifas mi ĉapon ne el katino,
Felon zibelan hatas mi plej.

Вспомнил я дедушку, вспомнил я
бабку,
Вспомнил кладбищенский рыхлый
снег.

Mi rememoris pri avo, avino,
Neĝon sablozan en la tombej’.

Все успокоились, все там будем,
Как в этой жизни радей не радей, –
Вот почему так тянусь я к людям,
Вот почему так люблю людей.

Ĉiuj pacdormas, kaj ni estos tie,
Spite al ludoj kun nia fortun’.
Tial min logas homoj plipie,
Tial la homojn amas mi nun.

Вот отчего я чуть-чуть не заплакал
И, улыбаясь, душой погас, –
Эту избу на крыльце с собакой
Словно я вижу в последний раз.
1925

Tial mi estas ĉe plora abundo,
Penridetante sen ajna ĝoj’.
Tiun ĉi domon kun nia hundo
Ŝajne mi vidas en lasta foj’.
trad. en 2015



Не жалею, не зову, не плачу

Nek bedaŭroj, nek vead’, nek ploro

Не жалею, не зову, не плачу,
Всё пройдёт, как с белых яблонь
дым.
Увядаешь золотом охваченный,
Я не буду больше молодым.

Nek bedaŭroj, nek vead’, nek
ploro.
Ĉio velkos, kiel poma flor’.
En aŭtuna folifala oro
Estos juna mi nur en memor’.

Ты теперь не так уж будешь биться,
Сердце, тронутое холодком,
И страна берёзового ситца
Не заманит шляться босиком.

Ne plu ardos koro eksjunula
Sen katen’ de frunaiva am’,
Kaj la lando de katun’ betula
Ne plu logos nudpiedi jam.

Дух бродяжий! Ты всё реже, реже
Расшевеливаешь пламень уст.
О моя утраченная свежесть,
Буйство глаз и половодье чувств.

Malpli ofte la vagant-spirita
Flagras flamo de vortum-abund’.
Ho vi, mia freŝo eltrivita,
Rigard-ard’ kaj emoci-inund’.

Я теперь скупее стал в желаньях.
Жизнь моя, иль ты приснилась мне?

Pli mizera iĝis mia sento.
Ĉu la vivo estis halucin’?

Словно я весенней гулкой ранью
Проскакал на розовом коне.

Kvazaŭ en printempa frumomento
Rozĉevalo preterportis min.

Все мы, все мы в этом мире тленны.
Тихо льётся с клёнов листьев медь...
Будь же ты вовек благословенно,
Что пришло процветать и умереть.

1921

De l' acer' folioj falas sterne.
Ĉiujn nin atendas sama sort' ...
Estu do benata poreterne
Destinito por florad' kaj mort'.

trad. en 2015



Гори, звезда моя, не падай...

Bruladu mia stel' sen falo...

Гори, звезда моя, не падай,
Роняй холодные лучи,
Ведь за кладбищенской оградой
Живое сердце не стучит.

Bruladu mia stel' sen falo,
Radiojn sendu de alt-for',
Ĉar post la tomba vivfinalo
Ne pulsas ja la homa kor'.

Ты светишь августом и рожью
И наполняешь тишь полей
Такой рыдалистою дрожью
Неотлетевших журавлей.

Vi lumas per aŭgust' kaj herboj,
Sub vi pleniĝas la kampar'
Per ploro de la grujaj herdoj,
Ne elmigrintaj al transmar'.

И, голову вздымая выше,
Не то за рощей – за холмом
Я снова чью-то песню слышу
Про отчий край и отчий дом.

Kaj eklevante supren kapon,
Ĉu el arbar', ĉu trans la holm'
Denove aŭdas mi la kanton
Pri patra land' kaj patra dom'.

И золотеющая осень,
В берёзах убавляя сок,
За всех, кого любил и бросил,
Листовою плачет на песок.

Bremsante sukoni de betuloj,
La oriĝanta jam aŭtun'
Pri l' forlasitaj proksimumoj
Per folifalo ploras nun.

Я знаю, знаю. Скоро, скоро
Ни по моей, ни чьей вине
Под низким траурным забором
Лечь придётся так же мне.

Mi scias, scias. Baldaŭ, baldaŭ
Kaj ŝajne pro nenies kulp'
En la malvarma tombo barda
Ekkuŝos mi post la sepult'.

Погаснет ласковое пламя,
И сердце превратится в прах.

Etingos sablo la kanzonon,
Polvigos mian koron mort'.

Amikoj metos grizan ŝtonon
Kun sprita epitafa vort'.

Kredante la funebran skandon,
Mi tamen skribus sur tabul' :
«Li same amis patrolandon
Kiel drinkejon la drinkul'».

trad. en 2015



Ĝis revid', amiko, ĝis revido

Ĝis revid', amiko, ĝis revido,
Vi por mi plej karas en la mond'.
Destinita por disiĝ' decido
Gvidas al estonta rerenkont'.

Ĝis revid', amik', sen mano kaj
sen vorto.

Ne çagrenu per la brova mov', –
En çi vivo ja ne novas morto,
Sed la viv' ne estas certe nov'.
trad. en 2015



Ĉiuj ni foriras senevite...

Ĉiuj ni foriras senevite
Al la lando de trankvil' kaj ĝoj'.
Eble baldaŭ ankaŭ mi subite
Pakos miajn aĵojn por la voĵ'.

Ho vi, plenaj de ĉarmec' betuloj!
Vi, teren' ! Kaj vi, ebena for'!
Ĉe la tuta ar' de forpasuloj

Я не в силах скрыть своей тоски.

Ne kaŝeblas mia korangor'.

Слишком я любил на этом свете
Всё, что душу облакает в плоть.
Мир осинам, что, раскинув ветви,
Загляделись в розовую водь.

Mi tro amis ĉion materialan,
Veston de l' anim' sur nia ter'.
Amis mi tremolon tremfolian,
Rigardantan glacon de river'.

Много дум я в тишине продумал,
Много песен про себя сложил.
И на этой на земле угрюмой
Счастлив тем, что я дышал и жил.

Multajn pensojn pensis mi pri
vero,
Multajn kantojn verkis en inspir'.
Kaj feliĉas mi, ke sur la tero
Vivis mi serene, en plenspir'.

Счастлив тем, что целовал я женщин,
Мял цветы, валялся на траве
И зверьё, как братьев наших
меньших,
Никогда не бил по голове.

Kisis mi virinojn plaĉaspektajn,
Ĉifis florojn, kuŝis en freŝkamp',
Kaj la bestojn, niajn fratojn etajn,
Mi neniam batis kontraŭ kap'.

Знаю я, что не цветут там чащи,
Не звенит лебязьей шеей рожь.
Оттого пред сонмом уходящих
Я всегда испытываю дрожь.

Scias mi – ne floras tie plantoj,
Ne sonoras cigna kol' de spik'.
Tial ĉe la ar' de forpasantoj
Spertas mi tremadon de panik'.

Знаю я, что в той стране не будет
Этих нив, златящихся во мгле.
Оттого и дороги мне люди,
Что живут со мною на земле.

Scias mi – ne estos tie pomoj
Nek grenkamp', oranta en malhel'.
Tial karas por mi ĉiuj homoj,
Kiuj vivas pace sub ĉiel'.

1924

trad. en 2015



Отговорила роща золотая

Ne plu parolas la arbaro ora

Отговорила роща золотая
Берёзовым весёлым языком,
И журавли, печально пролетая,
Уж не жалеют больше ни о ком.

Ne plu parolas la arbaro ora
Per la lingvaĵo gaja de betul'.
Preterflugante la guar' minora
Ĉagrenas pri neniuj jam estul'.

Кого жалеть? Ведь каждый в мире

Kompati kiun? Ĉiuj provizoras

странник	Venante l' mondon kaj irante plu.
Пройдёт, зайдёт и вновь оставит дом.	Pri l' forpasintoj kanabejo ploras
О всех ушедших грезит конопляник	Kaj plena luno super akva blu'.
С широким месяцем над голубым прудом.	

Стою один среди равнины голой,	En nuda kampo staras mi sol sola,
А журавлей относит ветер в даль.	Gruaron vento portas al la for'.
Я полон дум о юности весёлой,	Mi rememoras pri l' junaĝ' petola,
Но ничего в прошедшем мне не жаль.	Sed ne bedaŭras ĝin jam mia kor'.

Не жаль мне лет, растраченных	Pri l' vana viv' ne estas plu
напрасно,	ĉagreno,
Не жаль души сиреневую цветъ.	Nek pri l' siringa flor' de la anim'.
В саду горит костёр рябины красной,	La sorpa ruĝo flagras en ĝardeno,
Но никого не может он согреть.	Sed tiu flamo ne varmigas min.

Не обгорят рябиновые кисти,	Ĝi ne brulfarbos berojn nigrabrune
От желтизны не пропадёт трава.	Kaj ne flavigos verdon de herbar'.
Как дерево роняет тихо листья,	Kiel foliojn perdas arb' aŭtune,
Так я роняю грустные слова.	Fallasas mi la vortojn kun amar'.

И если время, ветром разметая,	Kaj se la tempo kiel vent' rigora
Сгребёт их все в один ненужный ком,	Ĉifpremos ilin je balasta ar',
Скажите так... что роща золотая	Vi diru tiel... la arbaro ora
Отговорила милым языком.	Ne plu parolas per lingvaj' de
1924	ĉarm'.

trad. en 2015



Собаке Качалова

Al la hundo de Kaĉalov¹

Дай, Джим, на счастье лапу мне,
Такую лапу не встречал я сроду.
Давай с тобой полаем при луне

Piedon donu, Jim², por la fortun',
Neniam tian vidis mi sur tero.
Kaj nun ni kune boju sub la lun'

¹ *Kaĉalov Vasilij* (1875-1948) – fama rusa aktoro, ano de la Moskva Arta Teatro, ricevinta en 1936 honoran titolon “Popola artisto de USSR”.

² *Jim* [ĝim] – voknomo de la hundo.

На тихую, бесшумную погоду.
Дай, Джим, на счастье лапу мне.

Al milda kaj senbrua bonvetero.
Piedon donu, Jim, por la fortun'.

Пожалуйста, голубчик, не лижись.
Пойми со мной хоть самое простое.
Ведь ты не знаешь, что такое жизнь,
Не знаешь ты, что жить на свете
стоит.

Bonvolu min ne leki en naiv'.
Komprene ion el la senc-masivo.
Ja vi ne scias, kio estas viv',
Ne scias vi valoron de la vivo.

Хозяин твой и мил, и знаменит,
И у него гостей бывает в доме много,
И каждый, улыбаясь, норовит
Тебя по шерсти бархатной потрогать.

Jen via fama mastro-bonvivant'
Akceptas ĉiam hejme gastajn
arojn,
Kaj strebas ĉiu lia vizitant'
Karesi viajn velurecajn harojn.

Ты по-собачьи дьявольски красив,
С такою милою доверчивой
приятцей,
И никого ни капли не спросив,
Как пьяный друг, ты лезешь
целоваться.

Vi ĉarmas pro belega hundaspekt',
Pro via naiveco simpatia,
Al ĉiu gasto vi sen ajna pet'
Kisŝovas vin kiel amik' ebria.

Мой милый Джим, среди твоих
гостей
Так много всяких и не всяких было,
Но та, что всех безмолвней и
грустней,
Сюда случайно вдруг не заходила?

Ho, kara Jim, en via hejma sin'
Diversaj gastoj en abund' orbitis,
Sed la plej trista kaj silenta in'
Ĉu vian domon pro hazard'
vizitis ?

Она придёт, даю тебе поруку,
И без меня, в её уставясь взгляд,
Ты за меня лизни ей нежно руку
За всё, в чём был и не был виноват.

Ŝi venos, vetas mi ĉampanon.
Do vi sen mi, okulo-al-okul',
Tenere leku ŝian mildan manon
Pro mia ŝajna kaj reala kulp'.

1925

trad. en 2015



**Спит ковыль. Равнина
дорогая...**

Спит ковыль. Равнина дорогая
И свинцовой свежести полынь.
Никакая родина другая
Не вольёт мне в грудь мою теплынь.

Знать, у всех у нас такая участь,
И, пожалуй, всякого спроси –
Радуюсь, свирепствуя и мучась,
Хорошо живётся на Руси?

Свет луны, таинственный и длинный.
Плачут вербы, шепчут тополя.
Но никто под окрик журавлиный
Не разлюбит отчие поля.

И теперь, когда вот новым светом
И моей коснулась жизнь судьбы,
Всё равно остался я поэтом
Золотой бревёнчатой избы.

По ночам, прижавшись к изголовью,
Вижу я, как сильного врага,
Как чужая юность брызжет новью
На мои поляны и луга.

Но и всё же, новью той теснимый,
Я могу прочувственно пропеть:
Дайте мне на родине любимой,
Всё любя, спокойно умереть.

1925

**Dormas stip'. Vastaĵo la plej
kara...**

Dormas stip'. Vastaĵo la plej kara
Kaj absint' de freŝa spic-odor'.
Ho, neniŭ bopatruj' alia
Verŝos varmon al la fila kor'.

Ŝajne, ĉiuj ni de l' sama sorto
Same pensas ĉiam pri l' demand':
En turmento, ĝoj' kaj malkomforto
Ĉu bonfartas ni en Rusa land'?

Luna lum', mistera, kontinua.
Salikplor' kaj popla susurad'.
Sed neniŭ sub blekado grua
Senamiĝos al la patroland'.

Nune, kiam de la nova vento
Tuŝis mian sorton la fantom',
Tutegale restis mi poeto
De eltraba ora vilaĝdom'.

Nokte, sendormante en alkovo,
Mi imagas ĵaluzeme plej :
Fremda junu ŝprucas per la novo
Al kamparo mia kaj herbej'.

Tamen mi sub prem' de l' ofensivo
Pretas kanti spite al la dram' :
Lasu min en la patruja sino
Morti kun la sent' de paca am'.

trad. en 2015

Mikaelo Bronŝtejn

Mi stelojn jungis al revado...

romanfragmento¹

Ŝlomo

1.

Leningrad, kiu multon spertis, kiu multon vidis, unuafoje tamen povis observi tian demonstrantaron – longa kolono, nerapide marŝanta tra la ĉefstratoj de la urbo, konsistanta el homoj de plej diversaj landoj, ne dividiĝas en apartajn grupojn de samlandanoj, ne kunportas iujn signojn, kiuj indikus apartenon al tiu aŭ alia nacio aŭ lando. Male – diverslandanoj intermiksiĝis; super la kolono flirtas nur ruĝaj standardoj kun la verda stelo, nur ruĝaj afiŝoj kun blankliteraj devizoj; kaj sonas unulingve la batala kanto proleta “Internacio”.

G.Demidjuk, “Meĵdunarodnij jazik” № 24, 1926

- KREDU, mi tre maltrankvilis. Kelkfoje mi vekiĝis ĉi-nokte en la hotelo, kaj je la kvara trans la fenestro mi vidis komenciĝon de pluveto. Ho, mi imagis, ke ni kaj niaj eksterlandaj gastoj devos marŝi sub la pluvo! Sed je la sepa la ĉielo jam estis pure pura!
- Vidu, amiko, tia estas nia Leningrado! Por hodiaŭ la vetero tre konvene enprogramigis siajn pluvojn: tiu frumatena okazis antaŭ nia manifestacio, sed la sekva – dum ni estis sidantaj en la Taŭrida palaco, dum la solena malfermo. Kaj ne plu pluvoj por hodiaŭ! Vidu, eĉ la naturo subtenas Esperanton!

Ŝlomo kaj Vasilj staris ĉe la bordo de Neva en amaso de diverslandaj esperantistoj, venintaj ĉi tien por spekti dismovon de la pontoj. Ĉe la noktomezo la ĉielo super iliaj kapoj restadis sennuba, kaj en la lunlumo ombro de la Vintra palaco, dormanta malantaŭ ili, falis en la riveron, kovrante ties grizan spacon preskaŭ ĝis la mezo. En la alia bordo estis bone videblaj la ŝtonaj bastionoj de la fortikaĵo kaj la rebrilanta orumita nadlo de la katedralo. Pli maldekstre, trans la Respublika ponto hirtis du kolonoj – hodiaŭ, speciale por Ŝlomo kaj Vasilj, por ĉiuj esperantistoj, oni bruligis fajrajn

¹ Daŭrigo. La antaŭajn partojn vidu en *REGo* №№ 2 (87) – 5 (90).

torĉojn surpinte de ambaŭ kolonoj. Iom for de la amaso, sur la Palaca placo ludis blovorkestro, kaj la solena muziko, atingante iliajn orelojn, aldonis specialan guston al ilia festa humoro.

Ili rigardis al Neva kaj al la ĉirkaŭantaj belaĵoj, foj-de-foje turnante sin por respondi al amikaj salutoj. La kongresanoj ne restadis surloke, sed la grupoj, promenantaj tien-teen laŭ la kajo apud la Vintra palaco, deflanke prezentis unu amikan festan amason. Jen Eŭgeno Miĥalski preterirante tuŝis la ŝultron de Vasilj; la poeto kaj lia amiko Leonid Ivanov promenis kun du germanaj fraŭlinoj. Jen Grigorij Demidjuk kaj Roberto Gienef laŭte salutis ilin. Jen alvenis por interŝanĝi kelkajn frazojn la hispano Francisko Azorin...

– Bonan matenon, knaboj! – aŭdis ili konatan voĉon. – Ĉu plaĉas al vi la loko?

Estis Francine kun Lucien kaj Talis. Paŝante inter du altaj viroj, ŝi tenis la kubutojn de ambaŭ kaj ŝajnis absolute feliĉa. La triopo aspektis speciale atentinda kaj rimarkinda: ĉarme svelta, laŭmode vestita juna virino, unu-flanke subtenata de alta blonda komandanto en parada uniformo kun ordeno sur ruĝa banto kaj aliflanke – de preskaŭ samalta ŝika eksterlandano kun eleganta barbeteto. La homoj, spektantaj ilian malrapidan iron, nelaŭte interŝanĝis laŭdajn aŭ envidajn komentojn.

Lucien elpoŝigis arĝentan horloĝon kaj forklakis la ornamitan fermilon.

– Ho, vi pravas, kara! – li diris. – Estas jam mateno. Do diru, indiĝeno, kiam oni komencos?

– Ĉu la dismovon? – precizige demandis Ŝlomo. – La pontoj estas dismovataj laŭ speciala horaro. Tiu ĉi, la Respublika (antaŭe ĝin oni nomis Palaca) estos dismovata post dudek minutoj.

– Mi senpacience atendas, – diris Francine. – Tiom da eventoj, tiom da impresoj hodiaŭ! Kaj jen la lasta – dismovo de la pontoj! Mia kapo ne eltenos, knaboj! Mi revas nur iomete rigardi, sed poste – tuj dormi!

– Oni devus enskribi ĉion, Fransin’, – konsilis Ŝlomo. – Dum la resto de la nokto vi ne sukcesos arkivigi en via kapo la impresojn de hieraŭ, sed hodiaŭ ja aperos novaj...

Subite aplaŭdoj aŭdiĝis ne tro fore de ili; la aplaŭdado estis proksimiĝanta al la kompanio. Post kelkaj momentoj Ŝlomo komprenis la kaŭzon – inter la esperantistoj iris laŭlonge de la kajo, salutante ĉiujn, Ernest Drezen, Semjon Podkaminer kaj Richard Lerchner; la homoj renkontis la ĉeforganizantojn de la Kongreso per salutkrioj kaj brua aplaŭdado.

Ankaŭ Ŝlomo aplaŭdis kun la geamikoj. Ho jes, la ĉeforganizantoj de la hodiaŭa triumfo, certe, meritis la aplaŭdojn. La kompanio flankeniĝis por liberigi la vojon, sed, alirinte ilin, Drezen haltis.

- Momenton, – li diris al la kompanoj. – jen estas bona kompanio, nia junularo!
 - Ankaŭ ni ne estas kadukuloj, – replikis Podkaminer.
 - Ho jes, sed tiuj ĉi gejunuloj estas nia espero! Saluton, samideanoj! – Drezen kapklinis al Francine kaj interŝanĝis manpremojn kun la viroj. – Ĉu bonas nia festo?
 - Certe, jes! – Vasilj respondis la unua. – Tiom da alilandaj amikoj! Kaj tiom da atento al ni! Mi legis la leningradajn ĵurnalojn – ĉiuj salutas, eĉ en Esperanto aperigas informojn!
 - Samideano... vi estas el Ukrainio, se mi ne eraras, ha? – demandis Drezen.
 - Jes, kamarado Koval estas kamparano, – sufloris Podkaminer, – kun tre neordinara historio de la esperantistiĝo. Mi supozas, Ernest Karloviĉ, ke vi legis...
 - Ho jes! – konfirmis Drezen. – Tiu kurso de Devjatnin por la militkapituloj... kaj mi vidas la rezulton – ni havas aktivajn samideanojn ankaŭ en foraj vilaĝoj!.. Sed vi, kamarado komandanto, estas jam kun ordeno! Miajn gratulojn!
 - Dankon, – diris Talis. – Mi ĝojas, ke mi sukcesis partopreni tiun ĉi feston. Estas vera triumfo de Esperanto! Nia marŝo laŭ la ĉefavenuo plaĉis al mi... ankaŭ la Taŭrida palaco, kie la solena malfermo okazis... ĝi estas tre bela. Kaj la salutvortoj de Lunaĉarskij, kaj la specialaj poŝtmarkoj! Certe, ankaŭ niaj gastoj alte aprezos ĉion.
 - Mi esperas... – Drezen klinis la kapon, montrante modestecon de sia rolo en la aferoj. – Almenaŭ, se iu el ili havis dubojn pri subteno de la internacia lingvo flanke de nia soveta registaro, ĉiuj ĉi duboj devas degeli sen ajna spuro. Aliflanke, nia registaro, nia partio ricevas konvenan imagon pri la proleta esperantistaro; ili ne plu hezitos daŭrigi subtenon de SEU, vidante, ke nia laboro utilas por vastigo de la komunismaj ideoj...
 - Eble, ili eĉ iom pli inklinos al la raciaj flankoj de la social-demokratia ideo, – intervenis Lerchner, sed Drezen preteratentis tion.
- Li ĵetis distritan rigardon al Francine, kiu nun staris, brakuminte la kubuton de Lucien, kaj turnis sin al Ŝlomo. Intertempe tiun aliris Semjon Podkaminer kaj metis la brakon sur lian ŝultron. Ŝlomo rimarkis, ke eĉ iom da miro aperis en la okuloj de Drezen, kiam li konstatis similecon de tiuj du nigraharaj krispaj junuloj.
- Mi ŝatus prezenti al vi, Ernest Karloviĉ, – diris Podkaminer, – estas mia samnomulo kaj grava helpanto pri la lokaj organizaj aferoj, Semjon Altman. Fakte estas li, kiu prizorgas niajn kontaktojn kun la loka

gazetaro, ankaŭ la artan programon, interalie, la koncerton, okazontan morgaŭ... ne, jam hodiaŭ, vespere.

– Bravulo, bravulo! – Drezen streĉe rigardis Ŝlomon. – Sed, Semjon, mi delonge konas lin, nur forgesis, ke estas via samnomulo. Ni estas konataj, Semjon, ŝajnas, ke eĉ dum kelkaj jaroj...

– Ni estas konataj, – konfirmis Ŝlomo. – Ekde la dudek dua jaro.

– Jes-jes... – elparolis Drezen kvazaŭ ion serĉante en la memoro. – Jes, do kiel fartas via edzino? Kial vi ne kunas nun ĉi tie?

– Vera... – respondis Ŝlomo, serĉante taŭgajn vortojn. – Ŝi fartas bone, dankon. Sed ŝi devas resti hejme kun la bebo.

– Kun la bebo?! – miksaĵo de diversaj sentoj aŭdiĝis en la voĉo de Drezen. – Nu-nu... Ĉu knabino aŭ knabo?

– Filo, – respondis Ŝlomo fiere. – Miĥail Semjonoviĉ.

Drezen plu rigardis lin, dezirante diri ion, sed tiumomente en la amaso sur la kajo aŭdiĝis ravaj krioj.

– Rigardu, rigardu! – ekkriis ankaŭ Francine. – La ponto! La ponto dismoviĝas!

Du grandegaj aloj de la Respublika ponto malrapide ekmoviĝis supren. Nenia mekanika bruo estis aŭdebla – verŝajne, pro la krioj kaj aplaŭdoj de la kelkcenta spektantaro. La aloj leviĝis pli kaj pli. En la interspaco jam videblis trans la rivero la konturoj de la katedralo de Petro kaj Paŭlo. Super la anĝelo sur la pinto de ties nadlo brilis kelkaj noktaj steloj, sed Ŝlomo vidis, ke unu el ili estas pli granda kaj pli brila ol la ceteraj. Ĝiajn radiojn respogulis kaj la orumita anĝelo, kaj la nadlo, kaj la plumbe griza akvo de Neva, kaj ŝajnis al Ŝlomo, ke la radioj estas verdaj.

... Ne la partia gvidanto, ne la politika agitisto donas al nia movado sian moralan subtenon – sed la literaturisto, la artisto, kiu pro sia talento estis jam mondfama antaŭ la Revolucio.

La SAT-movado jam ricevis aprobon de famuloj..., sed neniue el ili havis la eblecon, kiel K-do Lunaĉarski, doni al sia aprobo konkretan sekvon...

Ĉu la fakto, ke Lunaĉarski konsentis esti la honorprezidanto de nia VI-a, signifas, ke baldaŭ esperanto estos instruata en la sovetiaj lernejoj? Ne, estus tro frue tiri tian konkludon el tre esperiga okazo. Sed ne povas esti dubo, ke se ni daŭrigos senlace kaj unuece la bone komencitan laboron, ni povos atingi en limtempo pli malpli proksima, ke la sennacieca lingvo estos oficiale instruata en la sennacieca ŝtato laborista.

E.Lanti, “Sennaciulo” № 45, 1926

2.

Листок эсперантиста – Folio de esperantisto

Lastaj informoj

Telegramoj el eksterlando

Parizo – Federacio de francaj ministroj por manifesti solidarecon al la anglaj ministroj decidis organizi 24-horan strikon. Samtempe ili postulas pligrandigon de la laborpago.

Berlino – La 12-an de aŭgusto devas esti subskribita kontrakto inter germanaj kaj francaj metalentreprenistoj pri fondo de “Kontinenta Ferkartelo”, kun celo altigi la prezon de l’ fero.

Leningrada kroniko – En gubernia Intersindikata Komitato okazis kunveno kun partopreno de la dua germana delegitaro, konstatinta pliakrigitan atakon de la kapitalistaro kontraŭ laborista klaso kaj nepran neceson de l’ kreo de fera unuecfonto.

“Leningradskaja pravda”, la 4-an de aŭgusto, merkredo

Ŝlomo estas sola en sia ĉambro, se oni ne konsideru la ĉeeston de snufulo-Miŝko. Ankoraŭ hieraŭ Vera petis lin pri tiu hejma restado – ŝi devis trakuri kelkajn provizbutikojn, ĉar ŝia Slavik, ŝiadire, neniom spertas pri ŝparemo dum la aĉetado.

Ŝlomo meditas. Kredinde, tiu horeto estas ununura kvieta, meditpermesa tempo en la pasanta semajno. La antaŭtagmeza aŭgusta suno sukcesas lumigi per siaj rektaj radioj eĉ la puto-korton de lia domo; la taglumo venadas en la ĉambron honteme, humile, milde, kvazaŭ ĝi timus malhelpi la trankvilan spiron de Miŝko, dormanta en sia ligna liteto. Ŝlomo rigardas la filon kun tia tenereco, kian li, eble, evitus montri en ĉeesto de flankuloj, eĉ de la amikoj, kaj kun stranga sento de konvinkiteco, ke ĉio estos bonorda en la vivo de tiu ĉi hometo.

Ŝlomo meditas. Sed la sennuba estonto de Miŝko nestas en la parto de lia cerbo, destinita por memkompreneblaj kaj certaj aĵoj. Do la temo de liaj meditotoj estis tute alia. Li meditas pri Esperanto kaj esperantistoj. La triumfaj kongresaj tagoj estas rezulto ankaŭ de lia streĉa laboro ekde januaro, ne, eĉ pli frue. Kaj li rajtas fieri pri tia rezulto – nur fridanima kritikemulo povus diri, ke SAT-kongreso en Leningrado estis aĉe organizita! Sed mankas tiaj fridanimuloj en la amika rondo de la kongresanoj. Morgaŭ post la solena fermo ĉiuj adiaŭos unu la alian. Ili foriros al siaj landoj kaj urboj, ili revenos al siaj rutinaj aferoj, kaj ĉiu havos sian vojon. Por multaj tiu vojo estos glata kaj bonŝanca. Por aliaj – stumbliga kaj danĝera. Tia estas la vivo. Sed ja la plimulton nia kongreso kuraĝigis por iom ŝanĝi sian desti-

non, por kapti sian bonŝancon, por kontraŭstari la danĝerojn – kaj antaŭvidatajn, kaj subitajn.

Estus bone renkonti la nunajn kongresanojn iam en estonto. Post tridek jaroj. Ne, tio estus tro longa tempo, Ŝlomo opinias. Ĉiuj estos tute kadukaj. Ni renkontiĝu post dudek jaroj. Ĉi tie, en Leningrado. Kaj ni vidu, kio okazis al ni. Ni fanfaronu fiere pri sukcesoj kaj atingoj de niaj infanoj – certe, ankaŭ ili, tiutempe jam plenkreskaj, venos kun ni. Duoblan kvanton da kongresanoj ni havos minimume!

Ĉu ŝanĝiĝos niaj rilatoj intertempe? Ŝlomo heziteme skrapas la nukon. Jam nun li ne scias, kiel trakti la konduton de kelkaj konatoj kaj amikoj. Jam nun li devas reŝtopi sian konduton, ĉar li ne povas klare distingi, kiu estas kio...

Vasilj, simpla kamparano, tamen tre prudenta kaj honesta amiko. Tiun endas fidi senhezite. Sed estas Vasilj, kiu, evitante detalan konversacion, aludis, kvazaŭ la samnomulo de Ŝlomo, subtenanto de Ŝlomo ekde lia apero en la urbo, amiko kaj aldonita esperantisto, kvazaŭ Semjon kunlaboras kun GPU! Ĉu Ŝlomo kredu tion? Eble, jes... Sed ĉu tiu scio devas ŝanĝi ion en la rilatoj de Ŝlomo kaj Semjon? Ŝlomo hezitas. Se eĉ la diraĵo de Vasilj estas vero, certe... certe, Semjon faras tion sincere, zorgante pri la sekureco de nia ŝtato, pri protektado de ni ĉiuj kontraŭ kruelaj malamikoj kaj malbonfarantoj, kiuj volas pereigi nin, fiagante ekstere kaj ene de nia lando! Ankaŭ tiuj politikaj diskutoj, trudataj de Trockij kaj kompanio, nur malhelpas nian progreson! Sed tiuj kruelaĵoj, kiuj, onidire, estis farataj en ĈoKo kaj nun – en GPU, kion pri tio? Jes, eble, tio okazas – sed nur kontraŭ malamikoj... Nu, ankaŭ mistrakto povas okazi foje, sed oni korektas! Ŝlomo legis, ke kelkaj misverdiktoj estis abolitaj kaj la homoj ricevis liberon...

Jen la amiko de Francine, tiu elegantulo Lucien. Li loĝas en Moskvo dum kelkaj jaroj, li estas CK-ano de SEU. Sed kial li tiom bonvolas al personoj suspektindaj, kontraŭuloj de la nuna direkto, elektita de la bolŝevista partio? Al Karl Radek, ekzemple... ĉiuj ĵurnaloj skribas, ke tiu estas fiulo kaj amiko de Trockij. Damne, sed Trockij kaj Radek estas ne fiaj eseroj aŭ nepacigeblaj anarkiistoj, sed malnovaj bolŝevistoj, kunbatalintoj de Lenin! Nur antaŭ tri jaroj Gatĉina, ĉarma urbeto apud Leningrado, estis alinomita kaj iĝis Trock! Sed nun oni nomas tiujn homojn perfiduloj kaj malamikoj de laborularo... Kio okazis? Kio okazos poste?

Kaj nun – kion pri Drezen? Ŝlomo legadas ĉiujn liajn artikolojn kun sincera intereso kaj opinias ilin tre raciplenaj kaj utilaj por Esperanto. Evidentas, ke tiu homo sin ofertas al la ideo de la internacia lingvo. Ĉu SEU kreskas? Jes. Ĉu la literaturo en Esperanto aperas? Jes. Ĉu la sukceson de tiuj

ĉi tagoj ni ŝuldas plejparte al lia persona laboro kaj lia persona aŭtoritato ĉe la gvidantaro de Sovetio? Jes, sendube. Sed kion pri la persekutado de alipensemaj esperantistoj, pri la supozataj denuncoj, pri kiuj diras Vera? Kion pri la antaŭjara nokta averto de Semjon? Tiam li diris, ke Ŝlomo devas dekofoje pripensi ĉion antaŭ promeni kun virino de Drezen. Estis fakte averto pri reala minaco, sed nenio okazis, vidu!

Ŝlomo meditas. Sed la demandoj, tordantaj lian cerbon, ne trovas en lia meditado unusignifan, plencertan kaj konvinkan respondon.

3.

G.Demidjuk

Sub la signo de Edinburgo kaj Leningrado

Internacia revuo de la esperanta movado

... En Edinburgo kunvenis pli ol mil reprezentantoj de burĝaj Esperantaj movadoj el diversaj landoj: kaj el la “demokratia” respubliko Svisujo kaj el la respublikaj Francio kaj Ĉeĥoslovakio, kaj el la respubliko de Hindenburg; kunvenis do tiuj respublikanoj kaj ornamis la salonon de sia kunveno per ununura, sed tre karakteriza slogano: “Vivu la reĝo kaj Esperanto!”

... La Leningrada kongreso okazis samtempe kun la Edinburga. Kaj tiu samtempeco eĉ pli emfazis ilian diverspolusecon.

La diverspoluseco estis ne nur en la sloganoj: al la pasiva eksklamacio de Edinburgo – “Vivu la reĝo kaj Esperanto!” Leningrado kontraŭstarigis la sloganojn, plenajn de aktiveco, saturitajn de ago: “Esperanton – por servo al la proletaro!”, “Sub la standardo de leninismo – al la monda Oktobro!”

La diverspoluseco estis en la enhavo mem de la kongresoj: al la baloj, koncertoj kaj piknikoj de Edinburgo Leningrado kontraŭstarigis ekskluzive aferecan kongresecan laboron... la delegitoj kunvenis el diversaj landoj ne por vantaj paroloj pri Esperanto, sed por efektivigo de internacia solidareco de laboruloj per Esperanto.

“Mejdunarodnij jazik” № 3-4, 1926-27

Ho, kiom da homoj, kiom da bonaj homoj kunvenis apud la Palaco de Laboro! Kaj ĉiuj ja amikiĝis dum tiuj kongresaj tagoj! Post la solena fermo de la kongreso, viciĝante por la komuna fotado antaŭ la palaco, neniu insistas pri grupiĝo laŭlanda aŭ laŭurba. Blonda ridemulo Dima Sneĵko el Minsko, meditema tverano Vladimir Voronkin (aŭ Varankin – necesas rigardi en la notlibreto) – ili staras inter Otto Bäßler, germano, kaj tiu alta londonano, ŝajnas, ke lia nomo estas Atkinson. Ŝercemaj knaboj el Odeso, Sergeo Rublov kaj Kolja Danovskij, lokis sin apud hispanoj ne malpli babilemaj –

Azarin kaj Borel – kaj ion pridiskutas ridante. Jen la familia paro el Kremenĉug, Maria kaj Elio Izgur, konversacias kun Hilda Dresen, estonino...

– Do kie ni lokiĝu, Verinjo? – demandis Ŝlomo, observante la vicojn. – Mi ŝatus kelkloke, sed elektu vi.

– Slavik! – respondis Vera mokete. – Ja mi ne sukcesis konatiĝi kun multaj homoj! Kiel mi elektu?

Nur Miŝko en la infanĉareto diris nenion. Ho jes, li krietis antaŭ momento: verŝajne, lin iom timigis la bruo. Sed, ricevinte suĉilon, li tuj paciĝis – prudenta bebo – kaj nun umas trankvile, ĝuante la sunan posttagmezon.

– Hej, amikoj! Jes-jes, vi, kun la ĉareto! – kriis du korpulentaj finnoj en la centro de la unua vico. – Venu al ni kun via juna kongresano!

Certe, Vera iom hontis stari en la centro.

– Ho ne, dankon! – kriis ŝi al la finnoj. – Mi ne meritas... Ni staru tie, flanke!

Ŝlomo sekvis la rigardon de Vera – ankaŭ tie, en la dekstro de la unua vico, staris bonaj konatoj: moskva kolego-poeto Aleksandro Liljer, Griŝa Demidjuk kun la edzino, familio Yelland el Londono... Ĉiuj ili, rimarkinte la rigardon de Vera, eksvingis alvoke.

– Taŭgas, – diris Ŝlomo. – Ni lokiĝu tie, apud Griŝa.

“Tiel do ni vidos nin en la foto, – pensis Ŝlomo, ekstarante flanke apud Vera kun la ĉareto. – Post dudek jaroj. Kaj mi diros al Miŝko: – Nu, trovu vin en la foto! Ne povas vi, ĉu? Jen, jen vi estas, en la ĉareto!”

– Kamarado, – la manikon de Ŝlomo tuŝis iu preterpasanto. – Pardonu min, mi scivolas, kio okazas tie ĉi?

– Kongreso de proletaj esperantistoj, kamarado! – respondis Ŝlomo kun fiera rideto. – Ĉu vi ne legis en “Leningradskaja pravda?”

– Ho, mi nur hodiaŭ venis el Moskvo, – klarigis la juna viro. – Do esperantistoj... bone... permesu, ke mi prezentu min. Mi estas Elkind. Menahem Elkind el Palestino.

– Altman. Semjon Altman... – diris Ŝlomo necerte. – Sed vi diris, ke vi venis el Moskvo, kaj vi tute libere parolas la rusan...

– Ankaŭ la jidan, – Elkind respondis jide kun rideto, – kaj la ukrainan... Mi konjektu, ke Semjon vi estas ekde nelonge, – ruze palpebrumis Elkind. – Antaŭe vi estis... verŝajne, Solomon, Ŝlomo. Ĉu tiel?

– Ĝuste, – ridetis Ŝlomo. – sed...

– Kaj vi naskiĝis ie en Ukrainio, ĉu ne?

– Ĝuste, – denove respondis Ŝlomo. – Ĉu tio tuj rimarkeblas?

– Nu... ne por ĉiuj, – diris Elkind. – Sed mi rimarkis. Ĉar ankaŭ mi naskiĝis en Ukrainio. Vi – en kiu jaro?

- En la kvara, – respondis Ŝlomo. La kunparolanto ial plaĉis al li.
- Sed mi – je ses jaroj pli frue. Kaj mia familio elmigris en Palestinon. En la deknaŭa, – diris Elkind.
- Mia patro pereis tiam en Proskurov, – Ŝlomo klinis la kapon.
- Mi kondolencas, – diris Elkind. – Mi aŭdis – multaj pereis tie. Pri kio okupiĝis via patro?
- Pri ĝardenumado, – respondis Ŝlomo. – Ni havis pomĝardenon, eĉ vendadis la pomojn al Rumanio.
- Ho, brave! – entuziasmiĝis Elkind. – Sed pri kio vi okupiĝas ĉi tie?
- Mi estas elektristo, – Ŝlomo rigardis al Vera, kiu nun atentis la konversacion. – Jen estas mia edzino Vera kun la fileto. Vera instruas fremdajn lingvojn.
- Bonege! – Elkind montris ekstreman ĝojon. – Saluton, Vera! Ni bezonas, ni treege bezonas tiajn familiojn!
- Kiu estas “ni”? – demandis Ŝlomo iom suspekteme.
- Tuj mi klarigos, – kapjesis Elkind. – Ja mi venis el Palestino ĝuste por tio. Mi estis en Moskvo, en kelkaj viaj Narkomatoj. Mi ricevis permeson pri organizo de hebrea laborkomunumo en Krimeo. Agrikultura komunumo, ĉu vi komprenas? La Sovetoj disponigas al ni teritorion apud Saki. Ĉu vi estis en Krimeo?
- Ne, – diris Ŝlomo.
- Do ne gravas, – entuziasme daŭrigis Elkind. – Estas stepo tie. Nuda steparo. Sed ni havas sperton eĉ pri la dezertoj, kredu min! Ni aranĝos tie bonan mastrumadon. Sed por tio ni bezonas ankaŭ vin! Elektriston kaj instruistino!
- Sed... – diris Ŝlomo.
- Nenion respondu nun! – Elkind kelkfoje svingis la montrofingron malpermeso. – Mi komprenas, kion vi pensas nun. Jen subita nekonato kroĉiĝis surstrate kaj tuj agitas foriri el tiu belega urbo ien en la stepon... Mi ne agitas, karaj, mi nur proponas realan komunisman vivon! Sed vi havas jaron por pripensi mian proponon. Mi supozas, ke mi bezonas jaron por ordigi ĉiujn formalajojn.
- Li elpoŝigis notlibreton kaj krajonon kaj rapide skribis kelkajn liniojn.
- Jen estas mia adreso en Palestino, sed ĉi tie sube – la adreso de mia restado en Krimeo. Post kelkaj monatoj mi definitive transloĝiĝos tien. Se vi havos demandojn, skribu al mi.
- Unu demando jam estas, – diris Ŝlomo. – Kial tamen vi forveturas el Palestino al Sovetio?
- Politika afero, – tuj respondis Elkind. – Iam, en pli konvena tempo mi rakontos al vi. Iakaŭze mi estas certa, ke ni revidos nin. Ĝis!

Li malrapide ekpaŝis for kaj malaperis en la stratamaso. Ŝlomo ne longe sekvis lian paŝadon, ĉar al li kaj Vera jam impetis amikoj por adiaŭa brakumo.

Sur la ŝtuparo de la Palaco de Laboro jam sin instalis fajrobrigadista blovorkestro. La ruĝvangaj viroj en rebrilantaj kupraj kaskoj elblovis valsojn por la ravita publiko. Sur la Placo de Laboro gaje valsadis diversgentaj paroj. Super ili, en la balkono de la Palaco laboristoj jam estis nehaste malmuntantaj la grandegan sloganon: “SUKCESAN LABORON AL LA VI-a KONGRESO DE SAT!”

... Sur la tablo kuŝas aro da folioj por telegramoj; la poŝtadministracio zorgis ankaŭ ilin presi esperantlingve. Mi fordonas la leteron, certe, aŭfrankitan per la kongresaj esperantlingvaj poŝtmarkoj kaj rimarkas, ke oni stampas ĝin per speciala esperantlingva poŝtstampo! Fu! Tio jam ŝajnas esti el fantazia romano de Wells (Ŭels), transportinta min kelkajn jardekojn antaŭen. Des pli ke ankaŭ sur la stampo enestas la romane mistikaj, sed tre realaj por mi, literoj “SAT”...

G.Demidjuk, “Sennaciulo” № 46, 1926

ANONCO DE ANATOLO

Mi, reveninta de la siberia izoliteco al apudmoskvo (Brjansk) bedaŭrinde tre malbone vidanta, sed plena de Esperanto-ideoj kaj vervo labori por Esperanto, serĉas kun kiu labori kune. Mi serĉas soleloĝan samideaninon, kiu konas min (sekve partoprenis la Sovetian Esperantistan Junularan Movadon). Ni verkos artikolojn esperantlingvajn, movadajn, recenzajn; verkos beletrajn rakontojn, tradukos en Esperanton rusajn klasikaĵojn por publikigi en Esperanto-kulturaj revuoj ktp. Ĉiuj materialoj havos du aŭtorojn. Ni povas kunloĝi aŭ ĉe mi en Brjansk, aŭ ĉe ŝi, se ŝi havas dormolokon. La kunvivo montros ĉu nia samideaneco transiros al io pli serioza aŭ ni restos nur bonaj kunlaborantaj geamikoj, kio fakte ne gravas.

Anatolo Gonĉarov (Brjansk)

Omaĝe al la naskiĝtago de la Majstro

Ni denove kunvenis
Por saluti naskiĝon
De l' doktor' Esperanto
Inter la amikar".
Neĝ' kaj vento ne ĝenis
Nian kunon feliĉan
En verdaĵ de la planto
Lingva, en ĝia far'.

Majstro, ni vin gratulas!
Vian plej gravan tagon
Tra la mond' oni festas
En la ĝoj' kaj fier'.
Esperanto stimulas
Plijunigan imagon,
Kiu farojn sugestas
Kun venkem' kaj esper'.



Jen aperis romano,
Kiu arde rakontis
Pri lumad' kaj estingo
De la verda stelar'.
Pasis la uragano,
Kiun steloj alfrontis,
Ne pereis la lingvo,
Ondas ĝia vivmar'.

Ĝuu helan impreson
Pri la lingvoekzistoj,
Kiujn firme motivas
La kuniga valor'.
Jam la centan Kongreson
Festis esperantistoj,
Via lingvo plu vivas
En la mond' kaj la kor'!

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)



la 10-a Moskva LF okazis la 20-an de decembro



jubilea festeno en Krasnojarsk

☺ AMUZAJ MISSKRIBOJ KAJ ERAROJ ☺

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – en la artikoloj kaj informoj, senditaj por REGo:

esperantristo (*anst. esperantisto*)

deligitoj (*anst. delegitoj*)

Ĝojas ni, ke ja kostante / Ni parolas Esperante (*anst. konstante*)

junulara E-kubo (*anst. klubo*)

Loĝado: en blogoj kun necesejoj kaj duŝejoj (*anst. blokoj*)

mamlonga artikolo (*anst. mallonga*)

Ni kokre dankas (*anst. kore*)

nostalgia sento, kiu duras ege longe (*anst. daŭras*)

La noktomezo. La dekdua horo
Deklaris venon de la Nova jar'.
Forfalu malespero kaj doloro,
Forvaporiĝu premo kaj amar'.

Salutu l' Novan jaron Frosto-reĝo
En sia blanklanuge luksa vest',
Radiu stela lum', scintilu neĝo
Honore al la jarkomenca fest'!

Ridetoj kaj gastam' forgesu
ŝparon,
Malĝoj' ne venu eĉ per aludet',
Ja kiel vi renkontos Novan jaron,
Tiel ĝi pasos laŭ popola kred'!

Juniga ĝojo brilu en okuloj,
Feliĉe lumu ĉiu vort' kaj jar',
Kuniĝu koroj, glasoj kaj gratuloj!
La noktomez'. Bonvenon, Nova jar'!



Klara Ilutoviĉ (Elektrostalĵ), 2015

**FELIĈAN NOVAN
JARON AL ĈIUJ!**